

1976 oktobro

69-a jaro

n-ro 850 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

# esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)  
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Ĉiujare nova lando  
en la fokuso:  
Islando por 1977

# Vi trovos

en ĉi tiu numero klopodon trovi la kutiman vizaĝon de nia revuo. Post la junia numero grandparte dediĉita al la Financa Programo, post la julia/aŭgusta Estrara Raporto en la kovrila jako de nia revuo, post la kutima septembra lavango de kongresaj temoj, — tio ĉi denove estas refreŝige varia numero. Vi eventuale trovos, ke la venontjara kongresa lando okupis tro da spaco ĉi-foje. Nu, tio ja estas vero, kiun ni intencas ripeti plurfoje ĝis la sekvanta aŭgusto, ĉar la temoj kiel tiu de la islanda lingvisto Árni Bödvarsson (p.160-161) ne nepre celas turisme logi vin al la 62a Universala Kongreso, sed ili estas okazo por konatiĝi kun nova kulturo, kion pere de niaj paĝoj povas fari precipe tiuj legantoj, kiuj ne sukcesos viziti la kongresan landon. Krome kaj aliateme, troviĝos eble legantoj, kiuj opinios, ne nur, ke la raporto de Ulla Luin pri la SAT-Kongreso ricevis tro da spaco, sed ke ĝi okupas ankaŭ eminentan lokon en la unuaj paĝoj. Se vi el tio konkludas, ke io okazas inter SAT kaj UEA, vi estas sur la ĝusta vojo, ĉar oni efektive faras seriozajn klopodojn ĉesigi la longtempan reciprokan ignoron de la du organizaĵoj kaj anstataŭe atingi kunlaboron en la kampoj kie la interesoj identas. Nepre meritas tralegon ankaŭ la originala prozaĵo de Endre Tóth. La vigleco de la rakontofluo kompensas la vakuon, kiun kreas la iom morna temo de la premiita prozaĵo.

Konvenas ankaŭ scii, ke pri ĉiuj oblikvaj linioj en la numero kulpas Stefan MacGill, kiu enpaĝigis la numeron, dum pri eventualaj neenfokusigitaj fotoj kulpas Hans Wijmer, kiu volontulis ĉe la fotografado. Pri la oblikvaj frazoj, kompreneble, kulpas la redaktoro.

## Enhavo

- 157 Post Ateno: Ĉeftemo refoje (S. Milojević)
- 158 La 49a Kongreso de SAT: Por pozitiva kunlaboro (Ulla Luin), Komisito pri sporto
- 159 Invito el Brazilo, La 28a Kongreso de IFEF: Rikolto de ideoj (N. Subotić), Elektro de komitatanoj B
- 160 La lando de la 62a Universala Kongreso en 1977: La islanda — malnova kulturlingvo (Árni Bödvarsson)
- 162 Recenzoj ("Tamen la afero progresas", "Pri la varmo", "Doña Barbara")
- 163 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 164 Belartaj Konkursoj de UEA: En 1977 laŭ ŝanĝita regularo, Turniĝas la rado de l' historio (Vesna Skaljer-Race)
- 165 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 62a Universala Kongreso en Islando
- 167 Lappar, la antikristo (Endre Tóth)
- 171 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj), Abonservo de UEA
- 173 Nekrologoj (M. Budimir, G. Checco, E. Dancis, H.J. Jakobsson, M. Lukaš, J. v.d. Eynde, N.W. Vigar, J. Vilkki), Ekzameno E (B. Golden)
- 174 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 175 Kotiztabelo 1977
- 176 Esperanto en radio (G. Larglantier)

## La kovrilo

Pejzaĝo de Arnarstapi en la okcidenta parto de Islando (foto de J. Gisla-dóttir). Ĉiu lando aspektas bele en lerte kunmetitaj turismaj prospektoj kaj en la teknike perfektigita okulo de bona fotografisto. Islando aspektas rave eĉ en la realo. La virgeco de la islandaj pejzaĝoj estas pli neta en la unika islanda naturo, ol en la prospektoj de la Islanda Turisma Oficejo, inkluzive tiun riĉe ilustritan broŝuron, kiun vi ricevis kun nia septembra numero. Pro tiuj unikeco, beleco kaj netuŝiteco, vojaĝo al Islando estas fakte pilgrimo al lando, kiu en sia tuteco restas naturmuzeo, konservejo en kiu eblas nostalgie studi la iaman, antaŭindustrian aspekton de nia planedo. Tamen — paradokse — Islando estas unu el la plej evoluintaj landoj de la mondo. Feliĉe, ĝiaj pejzaĝoj ne "evoluis" dum la lastaj jarmiloj.

## esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

## Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono: (215) CL9 - 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

# Ĉeftemo refoje

IAM ANTAŬE ni skribis pri la foirecaj trajtoj de la Universalaj Kongresoj. Ne temas ĉi tie pri la organiza, arta kaj kultura niveloj de la Kongresoj. Ni parolas pri la simpla amasiĝo de tiuj centoj da kunvenoj, prelegoj, konferencoj, kunsidoj, prezentaĵoj, seminarioj, festaj aranĝoj, ekskursoj, ekspozicioj kaj ĉiaspecaj eventoj aliaj. Jam delonge fariĝis fizike neeble ĉeesti almenaŭ kaj nur tiujn aranĝojn pri kiuj oni havas personan aŭ profesian intereson. La Kongresoj efektive kaj plene fariĝis mondfoiroj, iaspeca ekspozicio pri preskaŭ ĉiuj facetoj de la internacia Esperanto-movado. Estante tiaj, la Kongresoj ne plu estas loko kie oni povas funde trakti difinitajn problemojn aŭ aspektojn de la Movado. Oni tie povas bone fintrakti temojn pri kiuj anticipe okazis vasta interŝanĝo de opinioj, la necesa pristudo de la koncerna demando, eventuala esploralaboro pri ĝi. Ne mankas ekzemploj pri la ĝusteco de la ĵus eldirita opinio: En Ateno oni facile kaj sukcese "solvis" eĉ tiel ampleksan demandon kia estas la Financa Programo de la Esperanto-Movado. Tamen, tio okazis nur pro la fakto, ke tiu granda iniciato enestis la tagordojn de diversaj movadaj forumoj jam plenajn du jarojn. Krom tio, ke ankaŭ nia revuo dediĉis plej grandan parton de la juna numero ĉi-jare al la Programo, antaŭ la Kongreso en Ateno aperis 64-paĝa manlibro pri la Programo sub la titolo *Financa Evoluigo*. Kiam oni faras tiel ampleksajn preparlaborojn, la Kongreso fariĝas la plej konvena loko por fintrakti la demandon. En simila traktoprocedo troviĝas nun pluraj aliaj grandaj temoj de la Movado, el kiuj ni menciis nur jenajn: Centro de Esploro kaj Dokumentado, Esperanta kulturo, reorganizo de la sidejo de UEA.

Aliflanke, ekzistas ankaŭ sufiĉe da ekzemploj, kiuj klare montras, ke sen ampleksaj kaj fundaj antaŭpreparoj, la rezultoj, kiujn oni atingas metante iun demandon en la kongresan tagordon, estas apenaŭ atentindaj. Tio ĉi aparte validas pri la maniero en kiu oni dum pluraj lastaj jaroj traktas la t.n. kongresajn ĉeftemojn. Eventuala escepto ĉi-rilate povus esti la pritrakto de la ĉeftemo en la 56a UK en Londono. Sed, en Ateno ekzemple, montriĝis, ke la kongresaj kunvenoj, kiuj traktis la du ĉeftemojn de la Kongreso ("Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo" kaj "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto") apenaŭ alportis rezultojn. Montriĝis, kompreneble, ke la enkondukoj, kiuj pri la du temoj aperis en la *Kongresa libro*, ne sufiĉis por funde trakti la temojn.

Ni eble limigu nian atenton nur al la dua ĉeftemo, tiu pri la nuntempa argumentado por la Internacia Lingvo. Se oni memoras, ke la fama *Principaro de Frostvallen* en Ateno havis sian 20an datrevenon, tiam la elekto

de la temo ankaŭ el tiu vidpunkto estis trafa kaj konvena. Tamen, sen ampleksaj preparoj por retrakti la temon, en Ateno oni sukcesis atingi nur tion, kio enestas la Kongresan Rezolucion 3 (v. la septembran numeron de nia revuo, p. 146). La unua alineo de tiu Rezolucio prave substrekas la gravecon de la *Principaro de Frostvallen* kaj notas ĝian pluan aktualecon. Tio ja estis la plej simpla, la plej facila vojo por memorigi pri la datreveno de la grava dokumento. Sed, oni povis atendi, ke la atena pritrakto de la *Principaro* klarigu kial tiu dokumento jam dum pluraj jaroj restas nur teksto, kiun oni ja fojfoje mencias, kaj ne samtempe ankaŭ ĉiutage aplikas kiel gvidilon por la informa laboro pri la Internacia Lingvo. Estas vero, ke la *Principaro* celis preskaŭ revoluciigi la movadan kampon de la informado, sed ĝis kiu grado tiu revolucio efektive okazis? Tio estas unu el la demandoj, kiujn devis respondi la atena traktado de la kongresa ĉeftemo.

Rerigardante la *Principaron* oni facile konstatas, ke multaj aspektoj de la informado, kodigitaj tie, simple ne plu funkcias kaj apenaŭ iam funkciis. Ĉu tio ne povus esti signo, ke la dokumento el Frostvallen bezonas alispecan pritrakton ol ĝi ricevis en Ateno? Ĉu ĝi do, tamen, bezonas almenaŭ ian supraĵan modernigan revizion? Cetere, la dua alineo de la menciita Rezolucio klare aludas la neceson modernigi la *Principaron*, ĉar ĝi rekomendas al la Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj "daŭrajn evoluigojn kaj aplikojn de modernaj kaj trafaj metodoj de informado". La titolo de la kongresa ĉeftemo estis ja tia, ke oni el ĝia pritrakto atendis ĝuste la listigon de "modernaj kaj trafaj metodoj", kiujn la Rezolucio mencias.

El raporto, kiun al la Komitato en Ateno prezentis la Komisiono pri informado, estis konstateble, ke pli vasta, pli funda, studa traktado de la demandaro pri la informado efektive okazas. Oni planas eldoni du pliajn konsilarojn (pri informado en scienc-teknikaj medioj kaj pri informa materialo), krom la jam aperinta teksto de *Argumentado por Esperanto*; estas planata seminario pri informado (verŝajne dum la UK en 1978); okazas prilaboro de la jam farita enketado pri la stato de la informa laboro en la landaj kaj fakaj asocioj de UEA kaj landaj sekcioj de TEJO.

Trudiĝas, fine, konkludo, ke la temo "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto" estis tro frue metita en la tagordon de la 61a UK en Ateno. Tiu frueco ne koncernas la aktualecon de la temo, sed la fakton, ke la jam entreprenitaj laboroj por pristudi la nunan staton de la informado ankoraŭ ne estas pretaj, nek aperis konkretaj iniciatoj por plua evoluigo de tiu kerna aspekto de la Esperanto-movado. Necesas do en baldaŭa estonteco retrakti la saman temon, sed tiam en alia, pli fruktodona maniero. Krome, oni estonte devus pli frue difini la kongresajn ĉeftemojn. Iom escepte, ni jam en Ateno eksciis, ke unu el la ĉeftemoj por Rejkjaviko estos "La rajto je komunikado". Sed, ĉu eĉ unu tuta jaro vere sufiĉas por fari tiajn antaŭpreparojn, kiuj igos kongresan temon efektive ĉefroli en la difinita Universala Kongreso?

sm

# Por pozitiva kunlaboro

**Kiel kutime dum la lastaj jaroj, UEA sendis sian reprezentanton al la Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). El tre ampleksa raporto de la reprezentanto ni aperigas kelkajn fragmentojn.**

DUM LA KONGRESO en Ateno, mi speciale atentis kiam iu parolis pri SAT, kaj mi trovis, ke en UEA la sinteno al SAT kaj al kunlaboro kun SAT estas pli pozitiva ol supozas la SAT-anoj mem. Mi menciis la decidon de la Komitato de UEA pri propono de la Komisiono pri eksteraj rilatoj: "Ni proponas similan agadon en aliaj landoj kaj petas la Estraron nomi komisiiton pri sindikata agado, kiu kunordigu la agadon sur internacia nivelo, kunlabore kun SAT, kaj ankaŭ ke oni kontaktu IFEF tiucele."

Mi partoprenis parton el la Kongreso de SAT en Gotenburgo kiel reprezentanto de UEA. En la inaŭguro, la saluto de UEA estis enprogramigita post la salutparoladoj de la prezidantoj de OKK, SAT kaj la honora komitato. Poste sekvis la salutoj de sindikatoj, LEAoj kaj frakcioj.

SAT estas **per**-Esperanta organizaĵo, ne **por**-Esperanta, kaj tion oni akcentis plurfoje dum la Kongreso. Ĝi kolektas en si tre diversajn ideologiojn, sen esti ligita al iu ajn politika partio. El la Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA), en diversaj lingvaj regionoj, tamen, unu el la plej gravaj laborkampoj estas la **por**-Esperanta agado. Tial la memstareco inter la LEAoj kaj SAT kaŭzas iom konfuzan bildon pri la ideologio al ekstero: neneŭtrala organizaĵo kiu estas partipolitike neŭtrala. La membroj povas aparteni al fakoj (ekz. Junulfako), kiuj estas integraj partoj de SAT, kaj al frakcioj, kiuj funkcias en la kadro de SAT sen esti organizaj partoj de ĝi.

La plej grava demando de la kongresaj laborkunsidoj en Gotenburgo temis pri ŝanĝo de la art. 13 de la Statuto de SAT. Ĝis nun ĝi enhavas la postulon, ke povas fariĝi membro de la Plenumkomitato (PK) nur tiu, kiu jam de almenaŭ tri jaroj rompis ĉiujn organizajn ligojn kun la neŭtrala Esperanto-movado. Venis proponoj anstataŭigi tiun postulon per reguloj, kiuj ne plu malhelpas al membro de UEA fariĝi PK-membro, se oni cetere povas fidi pri lia/ŝia fideleco al SAT. La diskuto pri ĉi tiu punkto ĉefe temis pri UEA. La fina voĉdono indikis, ke la sinteno al UEA estas relative pozitiva: El 120 ĉeestantoj voĉdonrajtaj, 80 voĉdonis por ŝanĝo de la statuta punkto, kaj ĉ. 30 kontraŭ. Tiu voĉdono servas nur kiel sugesto en la pli posta ĝenerala voĉdono inter ĉiuj membroj.

Elektitaj reprezentantoj de la LEAoj havis fermitan kunsidon, en kiu oni decidis ellabori komunan informilon/flugfolion, kiun oni povos disdoni ĉe ekzemple sindikataj kongresoj. La folioj aperos en pluraj lingvoj, sed sur ĉiu folio nur en unu lingvo.

Pri eblecoj de kunlaboro inter SAT kaj UEA, H. Tonkin jam pli frue interparolis kun P. Lévy, prezidanto de SAT. Lévy estas pozitiva al kunlaboro pri difinitaj projektoj, kiuj celas antaŭenigi ambaŭ organizaĵojn. Unu projekto jam pridiskutita estas kunordigo de la sindikata laboro. Tonkin sugestis al mi ankaŭ la temon de la Kontraŭrasisma jardeko, pri kio mi klopodis trakti. La Komisiono pri informado povus sekvi la evoluojn de la projekto pri la faldfolioj de LEAoj.

\*

La sveda ĉefministro Olof Palme sendis al la Kongreso salutleteron, kiu jam longe antaŭ la Kongreso estis publikigita (v. nian aprilan n-ro, p. 77). La ministro por eksterlandaj aferoj ankaŭ sendis saluton. Gotenbarga centra organizo de sindikatoj aranĝis vesperon por informi pri sindikatoj en Svedio kaj respondi al demandoj. La gazetaraj raporto estis pozitivaj, kvankam kiel kutime relative malmultaj kaj mallongaj.

La Kongreso estis bone aranĝita. La programo estis miksaĵo de distraj kaj laboraj eroj. Iom pli ol 300 personoj aliĝis, el miksitaj aĝoj; 20 landoj kaj 4 kontinentoj estis reprezentitaj. Pluraj personoj kun kiuj mi parolis montriĝis esti membroj de landaj asocioj de UEA. En la Organiza Kongresa Komitato (OKK), estis pluraj membroj de UEA, eĉ estraranoj de SEF kaj SEJU.

\*

La emo rigardi UEA kiel malamikan organizaĵon ekzistas en SAT, sed verŝajne ne havas majoritaton. Ŝajnas, ke la sama emo rigardi SAT kiel malamikon bedaŭrinde ekzistas en iuj rondoj de UEA. Tio povas kaŭzi konfuzan impreson pri la Esperanto-movado ĉe eksteruloj, kiuj ne vidas la diferencon inter diversaj esperantistoj. Plej bone oni venkas tian kontraŭstaron per pozitiva kunlaboro.

Ulla Luin

## Komisiito pri sporto

Kiel Komisiiton de UEA pri sporto, la Komitato elektis d-ro Gianfranco Polerani el Italujo. D-ro Polerani respondos pri kunordigo de la agado de UEA inter neesperantistaj sportaj organizoj (interalie la Olimpika Komitato) kaj pri ĝenerala evoluigo de utiligo de Esperanto en la sporto. Laŭ profesio d-ro Polerani estas specialisto pri ekonomiaj kaj impostaj aferoj en Milano, Italujo. Li estas revizoro de la Itala Esperanto-Federacio, kaj vicprezidanto de la Milana Esperanto-Klubo. Ideojn, informojn, komentojn kaj sugestojn, sendu al d-ro Polerani ĉe: Viale G. Suzzani, 2, I-20162 Milano, Italujo.



**INVITO EL BRAZILLO:** La 11an Brazilan Seminarion de Esperanto, en la ĉefurbo Brazilio, inter la 15a kaj 18a de julio, partoprenis ĉ.400 esperantistoj el la tuta Brazilo kaj kelkaj aliaj landoj. En la ferma solenaĵo de la Seminario, s-ro Torben Kehlet (dekstre sur la foto), kiu oficiale reprezentis UEA, transprenis inviton, ke en 1980 en la brazila ĉefurbo okazu la Universala Kongreso.

**LA 28a KONGRESO DE IFEF:**

## Rikolto de ideoj

**KOMENCE DE JUNIO** en la ĉarma, nordsveda urbeto Selefteo, kolektiĝis proksimume 500 fervojistoj-esperantistoj el 19 landoj por partopreni sian 28an kongreson. Jam la saluto en Esperanto, okaze de la eniro de la vagonaroj en la bele ornamitan stacidomon, bonvenigaj vortoj de la membroj de LKK ĉe la vagonaroj, estis signo, ke la Kongreso estos agrabla travivaĵo.

La inaŭguron, kiu okazis en la bela, granda salono de la moderna sportocentro, partoprenis multaj funkciuloj de la komunumo, distrikto, fervojo, sindikato, FISAIC (Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj) kaj la reprezentantoj de UEA kaj SAT. La sveda gazeto ĉiutage publikigadis sur la unua paĝo artikolojn kaj fotojn pri la Kongreso.

La laboro okazis en la komisionoj; la plej interesa estis tiu en la komisiono "informado-varbado". La unuan fojon estis aplikita speciala metodo de la laboro: la organizantoj disdonis slipojn kun pluraj demandoj (ekz. kiel aspektu afiŝo?) al kiuj necesis mallonge respondi kaj esprimi plej diversajn (eĉ neefektivigeblajn) ideojn. Ĉiun ideon oni notis (pli ol 80) kaj poste oni diskutos la eblecojn de efektivigo.

La kongresanoj havis multajn okazojn ekkoni la landon: en la persona kontakto kun svedoj kaj svedaj esperantistoj, en la vespera "forumo" dum kiu 3 horojn funkciuloj de la komunumo respondadis al plej diversaj

demandoj koncernantaj la vivon en Svedio, dum la fakprelego "la transportado de erco" kaj dum la tri belaj kaj interesaj ekskursoj.

N. Subotić

## Elektado de komitatanoj B

KONFORME al la art. 8 de la Statuto de UEA, en 1977 okazos novaj elektoj, interalie ankaŭ de komitatanoj B. Ilia oficperiodo komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Rejkjaviko.

Laŭ la Statuto kaj Regularoj de UEA, la elekto de komitatanoj B okazas jene:

"La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo ... unu komitatano por 250 delegitoj. La vicdelegitoj kaj fakdelegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon." (Statuto, art. 25). "Je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31a de decembro de la pasinta jaro estas elektata po unu komitatano B. Ĉiu komencita ducentkvindeko rajtigas al plia komitatano B." "Kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio; la kandidato devas skribi konsenti al sia kandidatiĝo." (Ĝenerala Regularo, art. 28). "Povas esti elektita kiel komitatano ... nur persono, kiu estis membro-abonanto de UEA almenaŭ dum la 3 jaroj antaŭ la jaro de la elektoj." (art. 30). "Ĉiuj komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj." (Statuto, art. 25).

Pro la enkonduko de kolektivaj abonoj kaj la ŝanĝo de la membro-sistemo ekde 1977, la Komitato decidis modifi la regularon tiel, ke "komitatano devas esti individua membro de UEA kaj abonanto de la revuo *Esperanto* (do eventuale kolektiva abonanto, kiu estas samtempe MJ).

En la momento de redakto (nome, antaŭ la fino de 1976) la nombro de elekteblaj komitatanoj B ankoraŭ ne estas certa, ĉar ĝin fiksis la nombro de ĉefdelegitoj kaj delegitoj je la 31a de decembro. Antaŭvideble, tamen, la nombro estos ĉirkaŭ ses. La direktoro de la Centra Oficejo petas la ĉefdelegitojn kaj delegitojn (ne la vicdelegitojn aŭ fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj kun iliaj skribaj konsentoj **antaŭ la 1-a de februaro 1977**. La proponantoj bonvolu zorgi, ke la kandidatigoj estu konformaj al la Statuto kaj Regularoj, kaj ke ili atingu la Centran Oficejon (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) antaŭ la indikita dato kune kun koncizaj biografiaj informoj pri la kandidato kaj pri lia ĝisnuna agado en la Esperanto-movado.

Post la forpaso de la fiksita dato, se la nombro de kandidatoj superos tiun de elektotaj komitatanoj B, la direktoro voĉdonigos ĉiujn ĉefdelegitojn kaj delegitojn kiuj rajtas voĉdoni. Pri la rezulto aperos informo en ĉi tiu revuo.

# La islanda – malnova kulturlingvo

LA ISLANDA apartenas al la norda (skandinava) branĉo de la ĝermanaj lingvoj, kiu, krome, dividiĝas en du pluajn branĉojn: la okcident-ĝermanan (la angla, germana, nederlanda, frisa k.a.) kaj la orient-ĝermanan (la antikva gotika, kiun oni parolis en sud-orienta Eŭropo ĉ. la jaroj 700-800). Sciencistoj grupigas la ĝermanajn lingvojn al la *centum*-grupo\* de la hindo-eŭropaj lingvoj, kune kun la latinidaj, keltaj kaj aliaj; la slavaj, hindaj kaj aliaj apartenas al la *satem*-grupo\*. Tiu grupigo baziĝas sur evoluaj principoj el la lingvoj de antikvaj ĝis la modernaj tempoj.

Krom la islanda, al la nord-ĝermanaj lingvoj apartenas ankaŭ la feroa (parolata en Feroaj Insuloj en la Norda Atlantiko), la norvega, sveda kaj dana lingvoj. La sesa kaj sepa skandinavaj lingvoj, la finna kaj la lapona, apartenas al la finn-ugra grupo, do ne estas hindeŭropaj kaj tial tute ne parencaj al la ceteraj skandinavaj lingvoj. Tio ne malhelpas, ke la skandinavaj popoloj, de Finnlando en la oriento ĝis Islando en la okcidento, rigardas sin kiel unu tuton. Grenlando, apartenanta al la dana ŝtato, ne estas rigardata kiel parto de Skandinavio, des pli ke ĝia lingvo parenkas al tiuj de la nordamerikaj eskimoj.

Ĉe la nordĝermanaj lingvoj la plej granda parenceco estas inter la sveda, dana kaj parte la norvega, unuflanke, kaj la islanda, feroa kaj parte la norvega, aliflanke. Hodiaŭ islandanoj kaj feroanoj reciproke povas legi la lingvon de la alia popolo, sen aparte lerni ĝin, sed kompreni la parolatan lingvon oni povas nur post lernado. Al iliaj lingvoj en multaj rilatoj similas precipe okcidentnorvegaj dialektoj, kvankam oni sin reciproke ĝenerale ne povas kompreni sen antaŭa lernado. Multaj orientnorvegaj dialektoj pli similas al danaj kaj svedaj idiomoj.

Tio provizore sufiĉu pri la hodiaŭa stato, la sinkroneco, kaj ni jen rigardu la historian evoluon, la diakronecon de la islanda lingvo.

Islandanoj havas en sia lingvo malnovan literaturon, ekde la 12a jarcento. La tiutempa lingvoformo tre multe similas al la hodiaŭa: sama deklinacia sistemo, preskaŭ neŝanĝitaj finaĵoj, kaj plejparte sama fonologio, malgraŭ sistemaj ŝoviĝoj en la vokalaro. Kompreneble, la vortaro ŝanĝiĝis, precipe pro tio ke la hodiaŭaj homoj kaj tiuj el la 12a jarcento havas malsamajn taskojn, malsamajn nociojn kaj malsamajn aferojn por solvi. Sed pri komunaj ideoj kaj taskoj la vortaro ĝenerale ne ŝanĝi-

iĝis de la antikva ĝis la hodiaŭa tempo. Tiu lingvoformo regis tiutempe en la tuta Skandinavio, kun esceptoj de regionoj en la nordaj partoj, kie loĝis laponoj. Ilian lingvon oni ne povis kompreni – kaj tial oni konsideris ilin sorĉistoj.

Tiun malnovan lingvon la islandanoj nomas malnov-islanda, kaj la norvegoj malnovnorvega. Ambaŭ verŝajne pravas. Sed, el la situo de la lando rezultas, ke la hodiaŭaj islandanoj, eĉ infanoj, facile povas legi multajn el la malnovaj prozaj tekstoj, se oni presigas ilin en moderna ortografio, neŝanĝante la lingvon. La poeziaj tekstoj ĝenerale estas pli malfacilaj. Ĉapitrojn el la antikva prozo oni legas en preskaŭ ĉiuj lernejoj, ankaŭ elementaj.

Tiuj plej malnovaj tekstoj konserviĝis en pergamenaj manuskriptoj el kiuj la plej malnovaj devenas el la 13a jarcento; post la 15a jarcento ekzistas multaj surpaperaj kopioj.

Granda parto de tiu malnova literaturo temas pri interfamiliaj kontaktoj, konfliktoj kaj noblaĵoj, kaj tial ili ofte nomiĝas "familiaj" aŭ "islandaj rakontoj" (ankaŭ "sagaoj"). Ili do ofte rakontas pri okazintaĵoj en antaŭaj jarcentoj, longe antaŭ la verkado, eĉ dum la 9a jarcento. Laŭ tiuj rakontoj – kiujn oni cetere pro diversaj kaŭzoj tiurilate ne pridubas – la unuaj islandanoj venis al la lando kaj ekloĝis tie en la 9a jarcento, plejparte venante el Norvegujo, sed ankaŭ el la britaj insuloj. Oni eĉ fiksas la unuan ekloĝon en Islando je la jaro 874 kaj tial en 1974 jubileis pri la 1100a datreveno. Ĉi tie oni menciis, ke verŝajne jam antaŭ tiu tempo vivis en Islando homoj alvenintaj el Irlando; la literaturo rakontas pri irlandaj ermitoj kaj iom da islandaj loknomoj, topografiaj, havas irlandlingvan devenon.

Laŭ la literatura tradicio, en la jaro 1000 (verŝajne pli ĝuste en 999) la islanda parlamento akceptis kristanisman kiel oficialan religion, anstataŭ la ĝistiaman branĉon de malnovĝermana religio (inter la dioj: Thoro, Vodano). Tiu decido fakte pruviĝis unu el la plej gravaj en la historio de Islando. Ĝuste per ĝi malfermiĝis por la popolo la pordoj al la tiutempaj internaciaj kulturo kaj scienco, kio estis en la manoj de la religiaj institucioj tiamaj. En la 11a jarcento tiel disvastiĝis en la islanda popolo la scio legi kaj skribi. Kompreneble, ne ĉiuj fariĝis kleruloj, tamen tion faris sufiĉe multaj laikoj aŭ aliaj nesciantoj de la latina (en la kristanismaj mondpartoj la tiama internacia scienca lingvo), tiel ke en la islanda socio kreiĝis bazo por verkista agado en la nacia lingvo.

\* Laŭ la latina kaj avesta vortoj por "cent".



**”Gamla konan” estas avino en la islanda: En ŝiaj rakontoj konserviĝis jarcentoj da tradicio. (Foto: B. Björnsson).**

Kaj, oni uzis tiun bazon. La islandanoj de la 13a jarcento eĉ verkis (ekz. skribis buŝajn rakontojn) pri jam mortintaj norvegaj reĝoj kaj epizodoj de la historio de Norvegujo. Tiuj manuskriptoj eĉ estis eksportataj al Norvegujo, uzataj kiel pagilo, ĉar ili estis multe pli facile kunportebaj ol la kutimaj varoj — feloj kaj fiŝo. Tiajn manuskriptojn oni eksportis ĝis la 14a jarcento kiam ŝanĝiĝis la intereso en Norvegujo, ĉar la kortego kaj la nobelaro ne plu povis kompreni la malnovan lingvon. Sed la islandanoj daŭre verkis en sia gepatra lingvo ankaŭ post perdo de sia sendependeco per subiĝo al la norvega reĝo en la jaroj 1262-64.

Geografia situo kaj aliaj naturaj kaŭzoj faris Islandon nealloga inter la fremdaj nobeloj por personoj, kiuj eble

volis ekhavi vere profitdonajn postenojn de la registaro. Tiel neniam estis relative multaj fremdaj postenuloj (juĝistoj, episkopoj ktp.) en Islando, kvankam kelkaj venis kaj fifamiĝis en la islanda historio. Do, postenuloj en Islando, ankaŭ altrangaj, plejparte estis enlandaj kaj uzis sian gepatran lingvon en sia regoserva agado. La reganta klaso tiel neniam provis forigi la enlandan lingvon. Inter kleruloj, la tiutempaj aliaj skandinavaj lingvoj, ekz. la dana, ankaŭ ne ĝuis grandan estimon ĝis la 18a jarcento. Kaj la ekzerco kaj tradicio, kiujn la islandanoj tiel havis por skribi kaj legi sian gepatran lingvon, kaŭzis, ke por ili ne estis malfacile traduki diservan kaj religian literaturon (ekz. la Biblion) en la enlandan lingvon; oni ja havis la tradician bazon. Post eltrovo de la presarto kaj post ĝia veno en Islandon, oni presis plejparte en la enlanda lingvo, por ke la popoloj povu legi. La unua libro presita en Islando verŝajne estis latinlingva preĝaro en 1534, preskaŭ tute perdita nun. Kaj la plej malnova ankoraŭ konservata libro presita en Islando verŝajne aperis en 1559, kaj poste aliaj sekvis. Sed la unuan ankoraŭ konservatan islandlingvan libron oni presis en Danujo en 1540 (La Nova Testamento). Dum jarcentoj oni presis preskaŭ nur religiaĵojn en Islando — kun malmultaj esceptoj. La profanaĵojn oni kutime kopiis mane. Tamen, la unua tia libro (kelkaj sagaoj) estis presita en Islando en 1688. Jam en la 15a jarcento kreskis en Islando aparta literatura ĝenro, speciala formo de eposa poezio, t.n. *rímur* (sing. *ríma*). En ili oni multfoje rerakontis malnovajn sagaojn aŭ aliajn rakontojn, kantis ilin laŭ speciala tipo de popola melodio. Tiu poezio mem dum jarcentoj multe kontribuis al la konservo de la islanda lingvo, konservante sian specifan formon kaj ĉiam uzante la malnovajn vortojn kaj vortformojn. En multaj kamparaj hejmoj oni kantis tiajn eposojn, anstataŭ legi rakontojn, ĝis la radio disvastiĝis en la nuna jarcento.

Tiu ĉi multspeca kaj viva literatura agado, buŝa kaj skriba aŭ presa, kontribuis al la konservo de la lingvo, kaj la fremda potenco, la dana registaro en Kopenhago, nenion faris por forigi la islandan lingvon kaj anstataŭigi ĝin per la dana. Oni povis ja ekspluati la landon kaj popolon sen ŝanĝi la lingvon.

Sub influo de la 18a-jarcenta humanismo kaj la 19a-jarcenta romantismo, memestimo de la popolo kaj estimo por la gepatra lingvo vekiĝis, kun rezulto de forta purismo, kiu tre malfacile allasas fremdajn elementojn en la lingvon. Ne temas nur pri purismaj kaŭzoj, sed ankaŭ pri la fakto, ke la lingvosistemo malpli bone taŭgas por fremdvortoj ol multaj aliaj lingvoj. La allasitajn fremdvortojn oni devas konformigi al la lingvo, ofte grave ŝanĝante ilin. En multaj okazoj, tamen, oni preferas fari novajn vortojn el islandlingvaj radikoj. Tiel oni ekz. allasis la fremdvorton *bíll* (akuzativo kaj radiko *bíl*) — aŭtomobilo, sed por la jet-aviadiloj oni formis enlandan vorton, *þota*, el la radiko *þjóta* - *þaut*, kiu signifas ”brue rapidegi”. Vortfarado, purismo kaj fremdaj vortoj en la islanda lingvo tamen estas speciala temo, pri kiu ni ĉi tie ne plu parolu.

Árni Böðvarsson

## La aromo de la pionira etoso

**Recenzas Carlo Minnaja (Italio):**

**Tamen la afero progresas!**, plena verkaro de L.L. Zamenhof, Kajero 4. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1975. 414p. 22cm. Bind.

En ĉiuj epokoj, en ĉiuj movadoj revuoj estis malakuratataj, personoj ne respondis al leteroj urĝaj, financaj problemoj turmentis la bonvolajn zorgantojn de eldono. Tiujn samajn problemojn spertis Zamenhof ankoraŭ en la lastaj jaroj de la pasinta jarcento. Li daŭre insistadis, ke abonantoj donas konfidon nur al akurate aperanta revuo, ekzemple li plendis al Nylén, ke en la mezo de marto 1898 li ankoraŭ ne ricevis la gazeton *Lingvo Internacia* de januaro. Aŭ paralele, li ricevis libromendojn, kiujn li ne povis plenumi, ĉar Gernet, "administrato" de la "Biblioteko", ne sendis al li la presitajn ekzemplerojn kaj ne respondis al leteroj. Ke nenio nova okazas sub la verda suno (kaj verŝajne ankaŭ sub ĉiukoloraj sunoj), atestas ankoraŭfoje la 4a kajero de la "iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof". Ĝi ampleksas la komencan tempon de *Lingvo Internacia*, de 1896 ĝis 1900, ĉirkaŭ kiu orbitis pluraj gravaj agantoj. La kolekto estas meritplena ne nur, ĉar ĝi reproponas malfacile akireblajn frutempaĵojn; ĝi ankaŭ abunde komentarias ilin, kaj retransportas nin en tiun pioniran etoson. Aperas paĝoj ne nur de Zamenhof, sed ankaŭ de aliaj tiamaj aktivuloj, famaj aŭ jam forgesitaj. Aparte atentinda estas la graveco donita al la recenzoj aperintaj pri la libroj de la "Biblioteko": la kompilinto prave evidentigas, kion pri la libroj verkis legintoj. Humura estas ekzemple protestletero de Devjatnin kontraŭ troa aprezo de lia talento okaze de la publikigo de *Nevola mortiginto*. Ankaŭ eble transmonde aspektas, ke poŝto tiutempe ŝajnis funkcii regule.

La impresio, kiun donas ĉi tiu libro, estas tute mala al seka sinsekvo de eldonaĵoj, aŭ al rigora kronologia ordo de leteroj aŭ artikoloj. Oni havas la impreson troviĝi en bone hejtata japana ĉambro, apud kameno, kie maljuna japano rakontas al ni pri fora epoko, abunde legante kaj citante. Ĉar, male al okcidentanaliza listo, en la libro kunfandiĝas ĉerpaĵoj el la malnovaj tempoj kun nunaj komentarioj: kvazaŭ kondukfadeno trediĝus tra la ampleksa volumo, kiu do redonas ne nur la tekstojn, sed la tutan parfumon de vivo dediĉita al idealo, konscia ke, por antaŭenigi siajn idealojn, oni devas fronti tute ordinarnajn problemetojn, kiel ĝisdatigon de adreslistoj, akuratan administradon de eĉ bagatelaj sumoj,

ktp. Ĉe komenco de paragrafo oni ne scias, ĉu temas pri komentario, pri citaĵo, pri jam presita artikolo: necesas atendi 2-3 paĝojn, sed tio tute ne gravas, ĉar oni estas trempita en la atmosfero, kreata samkvante de antikvaj tekstoj kaj modernaj linioj. Ni nuntempaj esperantistoj ĝenerale havas al la afero de la Internacia Lingvo tre optimisman rilaton, pli ol disradias tiuj praaj paĝoj: por ni temas pri plibonigo, tiuj pioniroj havis dubon pri plua ekzisto. Ho, kiom da kopejkoj devis humile kalkuli Zamenhof por ke UEA nun lanĉu finanĉan kampanjon!

Eldono ankaŭ estetike luksa, kiel la tri antaŭaj kajeroj.

**Prezo:** 21,— (por Nederlando 21,84) gld. plus sendokostoj 10%.

## Universitata nivelo

**Recenzas Rob Vetter (Nederlando):**

**Pri la varmo, la fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo**, de M. Túma. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1974. 215p. Ilus. 21cm.

Tro ofte oni indulge klasifas verkojn kiel sciencajn. Tiamaniere enrubrikigas ekzemple *Esperanto en Perspektivo* la, por faklaboristoj verkitan, *Fundamentoj de elektrokemio kaj elektrodeponado*, kaj la ĉarlatanaĵon *Kŭasaroj*. Sed *Pri la varmo* estas verko de efektiva scienca nivelo. Ne troviĝas probable multaj esperantistoj, kiuj profite povas legi ĉi tiun libron, kiu tamen estas klarprezenta enkonduko en la termodinamikon, fakon ekzamenatan en la komencaj jaroj de universitata aŭ altlerneja teknika studo. La prezo estas malalta pro eldona modesteco: teksto (bele) manskribita, kaj presita sur flaveca papero. Ĝi tamen aspektas sincere scienca, pro la multaj formuloj kaj grafikaĵoj. Kaj parenca fakuloj povus aĉeti ĝin por kvazaŭ senorde lasi ĝin sur la skribotablo, de kiu scivolaĉaj kolegoj sendube prenos ĝin — kaj ili estos devigitaj revizii sian opinion pri la Internacia Lingvo. Bedaŭrinde la verko enhavas multajn lingvajn erarojn, ĝeneralajn kaj faklingvajn. Svarmas frazoj kiel (paĝo 69): "Por la libervola neinversa ciklo dividita en n-nombrajn ciklojn de Carnot validas ĉi tiu malekvacio." Mi preferus: "Por ĉia neinvertigebla ciklo dividita en n ciklojn de Carnot validas ĉi tiu neegalaĵo." Necesus aldono de listo de korektendaĵoj. Indekso estus utila kompletigo. La libro denove akriĝas la strategian demandon: Kiel penetrigi Esperanton en la mondon de la natursciencoj, kie la angla ŝajnas solide enradikiĝinta? Aldone al tio restas la problemo, ke estas fakte preskaŭ neeble fari natursciencajn verkojn en Esperanto pro la manko de laŭteme ordigitaj fakterminaroj. Des pli estu laŭdata la kuraĝa kaj persistema aŭtoro de *Pri la varmo*.

**Prezo:** 6,— (por Nederlando 6,24) gld. plus 10% por sendokostoj.

# Fama verko en altnivela traduko

Recenzas Vilmos Benczik (Hungario):

**Doña Bárbara**, de R. Gallegos. El la hispana tradukis F. de Diego. Caracas: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 364p. 21cm. Broŝurita.

Rómulo Gallegos estas klasikulo ne nur de la venezuela literaturo: en lia verkaro reprezentigas la tuto de la latinamerika pensaro, aŭ almenaŭ tiu de la tropikaj zonoj de la kontinento. Ne estas hazardo, ke unu el la plej gravaj literaturaj premioj de la latinamerika literaturo portas lian nomon. Kaj estas iagrade simbolo ankaŭ lia kariero: pledante por la socia justeco, en 1948 li fariĝis prezidanto de la respubliko, sed post la unuaj progresemaĵoj paŝoj militista puĉo forpelis lin ne nur el la seĝo de prezidanto, sed ankaŭ el la lando mem.

*Doña Bárbara* — tiun ĉi romanon li verkis en 1929 — estas simbola verko, kie jam mem la nomoj de la figuroj (Bárbara: barbara; Luzardo: lumo, ktp.) pensigas pri valideco pli vasta, kion celas ankaŭ la disvolvo de la historio. Gallegos, adepto de la liberala burĝa demokratio, prezentas en la verko la barbarecon de la anakronisme trovivinta, specifa latinamerika feŭdismo. Lia prezento havas la virtojn kaj malvirtojn

kiujn ĉe tia verko oni atendas, nome, por la klareco kaj konsekvenca disvolvo de la aŭtoro intenco oni devas pagi per figuroj iom ekstremaj kaj unudimensiaj, tro tipaj, kaj certagrada didaktikeco en la historiotekso. Tiujn ĉi estetikajn malvirtojn tamen aprecinde kompensas la enciklopedia informriĉo de la verko, kaj la pompa, tamen natura stilo de la aŭtoro.

Kaj ĉi tie ni devas paroli pri la traduko mem. Fernando de Diego estas vera artisto de la tradukarto, kaj li plenumis sian taskon admirinde bone kaj bele. La sennombraj 'venezuelismoj' kaj la baroke pompa frazkonstruado faris lian taskon ekstreme malfacila, kaj de Diego neniam evitis tiujn malfacilaĵojn — kiel ofte okazas ĉe prozaj tradukoj — sed alfrontis kaj solvis ilin. Kompreneble, oni povus trovi ne malmultajn el liaj solvoj, pri kiuj eblus diskuti, sed nur surbaze de personaj preferoj: malgraŭ la transplanto de ĉiuj speciaromoj de la Gallegos-stilo, li neniam pekas kontraŭ la ĉefa regulo de la Esperanta lingvoarto — la klareco. Tamen necesas aldoni, ke la ambicia aliro de la traduktaskeco devigis lin eluzi la plenan leksikan arsenalon de PIV, kaj legantoj kun limigita vortkono certe trovos la tekston ne tre facila.

La traduko de *Doña Bárbara* estas sendube unu el la ĉefaj atingoj de la Esperanta proza tradukarto, kaj estas salutinde, ke ĝi estas interpreto de ekstereŭropa verko, eĉ se el kristana kultursfero. Ni esperu, ke la esperantista legantaro scios apreci ĝin.

**Prezo:** 16,20 (por Nederlando 16,85) gld. plus sendokostoj 10%.

## Laste aperis . . .

**Alfabeta katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien**, Parto II (literoj M-Z). Kompilis W. Hube kaj H. März. Wien: IEMW, 1975. 378p. 29cm. Bind. Prezo: 45,— gld.

**Arbareto ĉe Anykščiai**, A. Baranauskas (1835-1902). El la litova trad. P. Čeliauskas. Eldonis la tradukinto, 1975. 15p. 21cm. Mimeografita. Prezo: 3,— gld.

**Bildkarto kolora**, kun portreto de Julio Baghy. Prezo por 10 ekz. (minimuma mendo): 4,50 gld.

**Bodil kaj la bando**, Eva Hemmer Hansen (1913 - ). Trad. el la dana G. Riisberg. Aabyhøj: Dansk Esperanto Forlag, 1976. 128p. 20cm. ISBN 87 85020 877. Populara dana romaneto pri junulara temo. Prezo: 8,94 gld.

**Ĉu vi kuiras ĉine?**, J. Valano. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976. 20cm. ISBN 87 85020 885. Detektivromano originale verkita en Esperanto. Prezo: 12,30 gld.

**El Streĉita kordo**, K. Kalocsay (1891 - 1976). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1976. 28p. 18cm. Dek poemoj el la fama verko, kiu unue aperis en 1931. Prezo: 3,30 gld.

**Esperantologiaj kajeroj**, vol. 1. Redaktis I. Szerdahelyi. Budapeŝto: ELTE/BTK, 1976. 239p. 24cm. Gramatikaj studoj (de 5 aŭtoroj) pri fonologio, leksikologio, formologio kaj sintagmatiko de Esperanto. Prezo: 14,70 gld.

**Esperanto programmato** (1970), H. Behrmann. Trad. kaj adaptis por itallingvanoj F. Chiappetti, V. dall'Acqua, M. Lipari, C. Minnaja. Milano: Federazione Esperantista Italiana, 1974. 293p. (4 kajeroj), 20cm. Kun gramofondiskoj aŭ sonkaseto. Prezo: 30,—gld.

**Himeroj, La / Chimères, Les**, Gérard de Nerval (1808-1855). El la franca trad. G. Waringhien (1901- ). Ascoli Piceno: Gabrielli, 1976. Plejado, Beletro eldonserio 3. 74p. 20cm. Dulingva eldono (franca kaj Esperanto), ampleksa antaŭparolo, detalaj notoj. Prezo: 13,50 gld.

**Kantoj kaj poemoj de Robert Burns**, kantas M. Hill, deklamas W. Auld. Trad. el la angla W. Auld kaj R. Rossetti. Muzika aranĝo de M. kaj D. Hill; sakfluto: majoro W. Swinton. Falkirk (Skotl.): Krea Sono, 1976. 30cm. 33t/m. Duflanka. Stereofona. CSA1109. Prezo: 14,40 gld.

**Kongresa libro de la 61a UK en Ateno**. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1976. 112p. Ilus. 20cm. Prezo: 10,— gld.

**Kvitanclibreto**. Rotterdam 3003: Mondkomerca Eldonejo Esperantista (Poŝtkesto 25041), 1976. 80 kvitancoj en la Internacia Lingvo, binditaj en kajero kun karbonpapero kaj kopifolioj. Prezo: 3,18 gld.

**Mein geliebtes Esperanto; Wege zum Verständnis und zur Praxis der Internationalen Sprache**, Richard Schulz. Gerlingen/Stuttgart: Bleicher Verlag, 1976. 215p. 18cm. ISBN 3-921097-14-2. Ampleksa populara enkonduko al Esperanto por germanlingvanoj. Prezo: 13,80 gld.

**Universal language schemes in England and France 1600-1800**, James Knowlson. Toronto: University of Toronto Press, 1975. 301p. 23cm. Bind. ISBN 0-8020-5296-7. La verko enhavas 22-paĝan bibliografion kaj 10-paĝan indkson. Prezo: 66,— gld.

**LIBROSERVO DE UEA**, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldonigas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 16% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldonigas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— guldenoj.

# En 1977 laŭ Ŝanĝita Regularo

DUM la 61a UK en Ateno, la Komitato de UEA aprobis iujn ŝanĝojn en la Regularo pri la Belartaj Konkursoj.

Kiel eble plej baldaŭ oni presigos la novan Regularon, kaj anoncos en la revuo *Esperanto* kiam interesigantoj povos ricevi ekzemplerojn.

Intertempe estas listigitaj ĉi-sube en resuma formo la ŝanĝoj enkondukitaj, kompare kun la ĝisnuna Regularo, kiu aperis en la Jarlibro 1965, p.1/132/134, kiel ankaŭ en la broŝuro *Statuto kaj regularoj de UEA*.

**Art. 1.** 1. Estas aldonitaj du branĉoj: (i) **Eseo originala** pri temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo aŭ ĝia uzado — Premio Luigi Minnaja (proksimuma longo 10 tajpitaj paĝoj: ĉirkaŭ 400 x 65 maŝinskribitaj spacoj). (ii) **Fotografio** (la fotografaĵoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj, kaj de minimuma formato 13 x 18cm).

2. Ne plu ekzistos longlimo por poemoj.

3. Estas forigitaj ĉiuj tradukaj branĉoj, sed UEA povos doni sian aŭspicion al tradukkonkursoj organizotaj de landaj asocioj aŭ aliaj fidindaj institucioj.

**Art. 2.** 1. Konkursanto ne plu bezonos esti aŭ membro de la koncerna UK aŭ individua membro de UEA.

2. Ne rajtos konkursi iu, kiu dum la tri tuj antaŭaj jaroj gajnis unuan premion en la branĉo por kiu li konkursas.

3. Ĉiu konkursanto devas aldoni (se tion permesas la poŝtreguloj de lia lando) kvin internaciajn respond-kuponojn por ĉiu branĉo, en kiu li konkursas.

4. La aŭtoro de premiita verko konsentas cedi la kopi-rajton senpage en okazo de la eldono de almanako aŭ antologio de la Belartaj Konkursoj, se ties apero estas aprobita de UEA.

5. Konkursaĵojn por la branĉo **fotografio** oni devas sendi, ne al la sekretario de la Belartaj Konkursoj, sed al "Foto-konkurso", per adreso de la Loka Kongresa Komitato de la venonta UK, por atingi tiun adreson plej malfrue la 1-an de julio.

**Art. 3.** 1. En la branĉo **eseo originala** oni aljuĝas ne pli ol unu premion.

2. Oni enkondukas novan sistemon de poentado.

3. Ĉiu juĝanto preparas superrigardan raporton pri la konkursaĵoj, kiujn li prijuĝis; surbaze de tiuj raportoj la prezidanto de la Belartaj Konkursoj preparas ĝeneralan raporton, kiun oni presigas en *Esperanto* aŭ en alia revuo de UEA.

**Art. 4.** 1. Dum la aparta kongresa aranĝo dediĉita al la Belartaj Konkursoj, la prezidanto de la Konkursoj supervide raportas pri la koncernaj konkursoj.

2. Estas specife menciitaj la du apartaj premioj ĝis nun allasitaj de UEA, nome la premio "**Nova Talento**" (ĉiujare aljuĝata al tiu konkursanto, kiu plej meritas kur-aĝigon, sed neniam gajnis premion) ligita al la nomo "Henry Harabaĝiu" kaj la premio "Luigi Minnaja".

\* \* \*

Konsiderante la suprajn ŝanĝojn en la Regularo, ni faras jenan resumon de la kondiĉoj por partopreni en la Belartaj Konkursoj por 1977:

**Originala poezio** (tri premioj).

**Originala prozo** (tri premioj; maksimuma longeco 200 x 65 literspacoj).

**Originala eseo** (unu premio — "Luigi Minnaja"; pri la amplekso v. ĉi-supre).

**Originala drameto** (tri premioj; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj).

**Fotografio** (tri premioj; minimuma formato 13 x 18cm).

Por ĉiuj literaturaj branĉoj de la Konkursoj la limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas **la 31a de marto 1977**. Oni sendu ĉion rekte al la Sekretario de la Belartaj Konkursoj: s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey SM5 3SE, Britio. Ne forgesu, ke ĉiuj konkursaĵoj devas esti senditaj en tri ekzempleroj, signitaj per ĉifro, kun aldonita fermita koverto en kiu troviĝu la nomo kaj adreso de la konkursanto.

Ĉiujn konkursaĵojn por la branĉo **Fotografio** bv. sendi al: LKK de la 62a UK, Pósthólf 1081, Reykjavík, Islando. La limdato por la alveno (bv. kalkuli pri marpoŝta vojo) estas **la 30a de junio, 1977**.

## BELARTAJ KONKURSOJ 1976

### Originala poezio

Tria premio:

## Turniĝas la rado de l'historio

Turniĝas la rado  
de l'historio.

Ne klopodu haltigi ĝin —  
ĝia celo jam videblas  
en la spert' humana.

Turniĝas la rado.

Ne submetu vian piedon  
al ĝi —  
vi restos lama.

Turniĝas la rado.

Ne provu senmovigi ĝin  
per manoj viaj —  
penado vana.

Turniĝas la rado,  
jen sanga, flama —  
uragan' titana —  
jen kvietelana,  
kvazaŭ lud' infana.

Turniĝas la rado.

Restos fine nur  
memoro  
pri la korangoro,  
pri senlarma ploro  
pro la sanga floro,  
pri la senhonoro  
de l'sklavec' iama.

Vesna Skaljer-Race

**62a UNIVERSALA KONGRESO  
DE ESPERANTO, Rejkjaviko (Islando)  
1977 07 30 – 08 06**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,  
Rotterdam-3002, Nederlando.**

**Adreso de la LKK: Pósthólf 1081, Reykjavík.**

## Sub ŝtatestra protekto

La titolon de Alta Protektanto de la 62a Universala Kongreso de Esperanto akceptis la prezidanto de la respubliko Islando, d-ro Kristján Eldjárn. La ĉefministro de Islando estas unu el ok elstaraj personecoj de la islanda publika vivo, kiuj jam aniĝis en la Honora Komitato de la 62a UK. La ĝisnuna listo konsistas el: D-ro Sigurbjörn Einarsson, episkopo de Islando; s-ro Geir Hallgrímsson, ĉefministro; s-ro Vilhjálmur Hjálmarsson, ministro pri kulturo; d-ro Gylfi Th. Gíslason, eksministro pri kulturo; s-ro Magnús Torfi Ólafsson, eksministro pri kulturo; s-ro Sveinn Einarsson, direktoro de la Nacia Teatro; f-ino Vigdís Finnbogadóttir,

direktoro de la Urba Teatro; s-ino Sigríður Thorlacius, prezidanto de la Virina Sindikato.

## Elektaro en Rejkjaviko

En 1977 okazos novaj elektoj en UEA. Dum la Kongreso en Rejkjaviko, nove konsistigita Komitato de UEA elektos el siaj membroj novan Estraron por gvidi la Asocion dum la sekvonta trijara periodo. Ĝis la novaj elektoj, tamen, la Kongresa Prezidentaro konsistas el: D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA; d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA; prof. d-ro C. Støp-Bowitz, vicprezidanto de UEA; s-ro E.L.M. Wensing, ĝenerala sekretario de UEA; s-ro Baldur Ragnarsson, prezidanto de LKK kaj prezidanto de la Islanda Esperanto-Asocio; kaj la rektoro de ISU, elektota.

## LKK: Malgranda sed efika


Kiel konvenas en malgranda kongresurbo, la Loka Kongresa Komitato de Rejkjaviko konsistas el nur dek personoj. Sed tiu teamo jam brile pruvis siajn kapablojn, solvante kun modela akurateco grandan nombron da organizaj taskoj. Por eĉ pli efika funkciado, kiam necesas fari rapidajn decidojn, LKK nomis inter siaj membroj t.n. konstantan laborgrupon, kiu konsistas el la prezidanto, Baldur Ragnarsson; la vicprezidanto Árni Bödvarsson; kaj la sekretario, Hallgrímur Sæmundsson.

## KKS serĉata

Por malŝargi la direktoron de la Centra Oficejo de UEA, kiu dum la lastaj tri jaroj funkciis ankaŭ kiel Konstanta Kongresa Sekretario, la Estraro de UEA decidis serĉi kaj enoficigi novan KKS-on. Ankoraŭ ne estas certe, ĉu la elekto okazos baldaŭ, sed la nova funkciulo verŝajne okupos la funkcion jam antaŭ la UK en Rejkjaviko.

## Kiel atingi Islandon?

Ekzistas, kompreneble, du manieroj por atingi la kongreslandon: per ŝipo kaj per aviadilo. Kvankam iuj ŝiplinioj pasaĝeraj ankoraŭ funkcias (ekzemple aŭto-pramŝipo ekde la nordo de Skotlando), preskaŭ la tuta trafiko estas nuntempe aera. Regulaj rektaj fluglinioj ligas la islandan ĉefurbon kun Ĉikago, Duseldorfo, Feroaj Insuloj, Frankfurto, Glasgovo, Grenlando, Kopenhago, Londono, Luksemburgo, Nov-Jorko, Oslo kaj Stokholmo. Por fari la vojaĝon kiel eble plej facila kaj ekonomia, oni jam planas plurajn specialajn karavanojn. Por skandinavo, ekzemple, la multjara karavangvidanto s-ro Gustav Kühlmann (Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj) proponas vojaĝon ekde Kopenhago kaj reen, kiu kostas entute 1955 danajn kronojn, inkluzive de hotelo. (La normala prezo sen hotelo estas 2760 kronoj!). UEA mem preparas ĉartoflugojn por po 100-200 personoj el Parizo kaj Amsterdam. La prezo sen hotelo por la flugo Amsterdam-Rejkjaviko kaj reen estos



**La naturo petolas en Islando: Hvítserkur ("la blankĉemizulo"), enigma roko en la maro. (Foto: V. Sigurgeirsson).**

antaŭvideble ĉirkaŭ 600 guldenoj. Karavanoj ankaŭ el aliaj landoj estas konsiderataj. Ĉiuj legantoj, kiuj interesiĝas pri eventuala partopreno en ĉartoflugo de Amsterdam aŭ de Parizo estas petataj provizore sin anonci — tute sen ia sindevigo — per poŝtkarto al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

### Kiom kostas la loĝado?

La hotelaj prezoj en Rejkjaviko — laŭ la nun valida tarifo — varias de ĉ. 40 gld. ĝis ĉ. 90 gld. por ĉiu persono kaj nokto, inkluzive de la matenmanĝo, kompreneble depende de la kategorio. Ekzistas ankaŭ ebleco, ke LKK sukcesos, krome, aranĝi ian tre simplan amasloĝadon en lernejo.

### Unika "Inuk"

"Inuk" ne estas anagramo de "Unik", sed signifas homon en la grenlanda lingvo. Krome ĝi estas la titolo de moderna, kolektive verkita teatraĵo islanda, repertuara atuto de la Nacia Teatro de Islando. La aktoroj de "Inuk" — kiuj estas samtempe ĝiaj aŭtoroj — interesiĝas lerni Esperanton, kaj la verkon jam tradukis en la Internacian Lingvon Baldur Ragnarsson kaj Stefán Sigurdsson por prezento en la kadro de la Universala Kongreso.

### La vivoverko de Ósvaldur Knudsen

En la kadro de la UK estos prezentitaj pluraj filmoj de la antaŭ nelonge mortinta islanda filmisto Ósvaldur Knudsen, kiu dediĉis sin al arta filmado de la eventoplena islanda naturo. Unu tia filmo — la 28-minuta kolorfilmo "Tero el maro" — jam estis prezentita en esperantlingva varianto en la Eŭropa Kongreso en Eindhoven kaj en la Universala Kongreso en Ateno. Ĝia esperantigo estis ebla dank' al subvencioj de la Ŝtata Turisma Oficejo kaj Ministerio pri Kulturo, kiuj donis monon ankaŭ por aĉeto de unu kopio en Esperanto. Interesiĝantoj pri elmontrado de tiu filmo en aliaj landoj bv. turni sin al la adreso de LKK. La filmo estas 16-milimetra kun optika sono.

### Unua Bulteno ricevebla

Senpage ricevebla ĉe la kongresaj adresoj kaj ĉe landaj perantoj estas la impona 20-paĝa broŝuro "Islando: mondo de unikeco", kiu enhavas la Unuan Oficialan Bultenon de la UK. La eldonon subvenciis la Turisma Oficejo per sumo de 50 000 kronoj. Presita en kvanto de pli ol 22 000 ekzempleroj, la riĉe kolorilustrita broŝuro estas vaste distribuata tra la mondo kaj vekas grandan interesiĝon.

### Unuaj paŝoj ĉe la islanda gazetaro

Jam en 1974 LKK aranĝis televidan kaj ĵurnalan intervjuojn kun la prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, okaze de unu el liaj vizitoj al Islando. En aprilo ĉi-jare sekvis longa, ilustrita intervjuo kun la vic-direktoro de la CO,

en la ĵurnalo *Tíminn*. Krome LKK jam dissendis informbultenojn al la islandaj gazetaroj kaj radio por atentigi ilin pri la okazonta Kongreso.

### Demokratiigo de ekskursoj

La ekskursaj eblecoj en Islando estas vere spektaklaj. Sed la problemoj estas, ĝuste kiujn vidindaĵojn prefere proponi al la kongresanoj. Ne dezirante trudi siajn proprajn preferojn, LKK decidis sondi per demandaro la opiniojn de la anoj de la atena UK. Per la ricevitaĵoj ili kunmetos ĉiukaze allogan ekskursprogramon, kies detaloj aperos kiel kutime en la Dua Bulteno.

### TEJO en Francio

La 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos, ne en Islando, sed en Poitiers (Francio), de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 1977, t.e. post la Universala Kongreso en Rejkjaviko. Aliĝiloj estas preparataj, kaj ili estos riceveblaj ĉe la konstanta adreso en Rotterdam.

### Kotizoj ĝis la fino de decembro

Ĝis la 31a de decembro 1976 validas jenaj aliĝkotizoj (en guldenoj) por la Universala Kongreso en Rejkjaviko:

|                                                                                  |        |
|----------------------------------------------------------------------------------|--------|
| 1. Kongresano ne membro individua de UEA                                         | 165,00 |
| 2. Kongresano individua membro kun Jarlibro                                      | 140,00 |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj la revuo <i>Esperanto</i> | 115,00 |
| 4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1                                         | 115,50 |
| 5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3                                    | 98,00  |
| 6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara                                                  | 49,50  |
| 7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-jara                                   | 82,50  |
| 8. Blindulo                                                                      | 66,00  |


Aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso kaj landaj perantoj.

### Jam pli ol 300 aliĝoj

Ĝis la 12a de septembro estis registritaj jam 340 aliĝoj el 38 landoj. Plej multnombre aliĝis ĝis nun britoj, francoj, germanoj kaj nederlandanoj.



Kunsidas LKK de la 62a UK en Rejkjaviko (de maldekstre): Stefan Sigurdsson, Baldvin Skaftfell, Baldur Ragnarsson, Hallgrímur Sæmundsson, Árni Bödvarsson kaj Ólafur S. Magnússon.



ENDRE TÓTH:

# Lappar, la anti- kristo

BELARTAJ KONKURSOJ 1976  
Originala prozo, Unua premio

ILI VAGADIS ĉiam kune, kvarope. Ili estis nek pli, nek malpli bravaj, ol la ceteraj bubaĉoj de tiu epoko.  
— Ni faru vetkuron — kriis Lappar — Repo, Nodo, Tupy ni kuru senŝue sur la stoplejo!

— Senŝue ne eblas — diris Tupy sobre — ĉar la urtikoj vundos la piedojn.

— Tupy, vi havas malbonan haŭton, kaj vi havas malbonan sangon. Via sango estas certe nigra. Vi estas fatraso, kaj vi hontas pro via nigra sango.

Tupy senvorte ekkaŭris kaj komencis deŝnuri la ŝuojn.

— Hurrah! — kriis Lappar. — Mi estas la vento kaj mi muĝas super la kampoj! Repo, Nodo, Tupy, ankaŭ vi estas vento. Ni kuregas kiel tempesto super la kampoj. Ni zumegu! Ni estas la ventego kaj tondre kuregas super la kampoj!

Ili kriĉante atingis la transflankan sulkon.

— Mi estis la unua! — deklaris Lappar. — Mi estas la triumfanto!

Ĉiuj sidiĝis sur la tero. La ceteraj observadis siajn piedojn kun acida mieno.

— Rigardu, Lappar! — diris ribele Tupy. — Mia sango ne estas nigra. Mia sango estas ruĝa, kiel la via!

— Miaj piedoj eĉ ne sangas — fanfaronis Lappar, ne atentante pri la vortoj de Tupy. — Mi havas bonan dikan haŭton, via haŭto estas maldika, kaj vi ĉiuj estas fatrasoj. Nun ni kuru reen, kiel la ŝtormo.

La ceteraj stariĝis malinkline.

— Ni estas la timeginda armeo — kriegadis Lappar. — Tupy, vi estas la vicestro, Repo kaj Nodo, vi estas la soldatoj. Hurrah! Ni vadu en sango!

Ili revenis tien, kie restis la ŝuoj. Tiam jam sangis eĉ la piedoj de Lappar. — Mi estas Lappar, la Demonulo! — Li kaptis grandan nesolidan terbulon. — Mi pistas ŝtonon sur mia brusto! Rigardu! — La terbulo disfalis, kiam ĝi batiĝis al la brusto de Lappar. — Pistu ankaŭ vi ŝtonojn sur via brusto. Frakasu ŝtonojn kaj kantu! Ni estas la venkintoj kaj ni dancas triumfan dancon. — Kriĉante ili dancis per la doloraj piedoj, dumane ŝutante terbulojn kaj ŝtonetojn sur sian korpon. Ili fariĝis malpuraj de kapo ĝis piedoj.

— Mi estas Lappar, la Demona Estrego. Ni vadis en sango kaj ni triumfis. Ni disrompadas ŝtonojn sur niaj brustoj. Triumfo kaj gloro! — Tiujn vortojn li kriis fiksante siajn okulojn kun provoko rekte en la sunon.

\*

Ili vagadis laŭ la bordo de la rivereto.

— Ni kaptos fiŝojn — diris Lappar.

— Bonege, fiŝkaptado! — ĝojis Tupy. — Ni ŝtelos hokojn kaj tranĉos stangetojn.

— Mi bezonas nek hokon, nek stangeton. Mi kaptos fiŝojn per la nudaj manoj — vadis Lappar jam en la rivereto. Li kuris inter la fiŝojn, kiuj ripozis en la malprofunda akvo. Ĉirkaŭ liaj maleoloj brilis arĝentkoloraj ŝaŭmkronoj. La akvo ekbolis pro la fuĝo de la fiŝoj. Per fulmrapida movo li kaptis en la akvon, kaj jen, ĵetita fiŝeto jam flugis brile al la bordo.

— Mi kaptos por vi multegajn fiŝojn. Karasojn, ezokojn kaj karpojn. Hodiaŭ ni ĉiuj manĝos fiŝojn ĝis krevo.

La ceteraj ekinterbatalis por la predo, sed la sekva viktimo jam estis ĵetita. — Hodiaŭ mi kaptos ĉiujn fiŝojn el la rivereto! — Li kuradis tien kaj reen en la vibranta akvo, furioze persekutante la fiŝojn, kaj flugigis al la bordo la baraktantajn kaptitojn.

— Ĉu ĉiu havas jam sufiĉe? — li vadis eksteren el la rivereto, tenante en sia mano konvulsiantan beston.

— Ĉu vi jam manĝis? — li demandis, kun subite severiĝanta mieno.

— Antaŭ ol rosti ilin? — demandis Tupy naŭziĝante.

— Jes ja, sen rostado, hodiaŭ ni manĝos vivantajn fiŝojn. Rigardu! — Kaj li jam tenis antaŭ sia buŝo baraktanton. La ceteraj horore gapis lin. Li ekridaĉis:

— He, tamen ne! Hodiaŭ mi ne deziras fiŝon. Sed hodiaŭ en la vilaĝo ĉiu kato vespermanĝos karasojn, ezokojn kaj karpojn. Surstangigu ilin sur salikvergo! Rigardu, tiel! — Kaj ŝirinte branĉeton li montris, kiamaniere oni povas surstangigi la fiŝojn, pikante tra ilia blanko kaj buŝo. Poste li reekis al la rivereto. —

Rigardu, kiom da fiŝoj restis ankoraŭ! Mi kaptos ĉiujn! Hodiaŭ mi ekstermos ĉion vivan en la rivereto! Hodiaŭ ĉiu kato voros fiŝojn ĝis krevo. — Kaj li daŭrigis la mortigadon, tiel abunde ĵetante la predojn, ke la ceteraj apenaŭ povis surstangigi ilin.

Ekscititaj pro la febro de mortigado, Repo kaj Nodo kriegadis: — Plu! Ankoraŭ pli! Ĵetadu, Lappar! Vi estas la Mirinda Fiŝkaptisto!

— Mi estas la Demona Fiŝ-ekzekutisto! — kriis Lappar, ne laciĝante en la ektermado.

Tupy rigardis lin, kun ĵaluza malamego.

Baldaŭ ili ekkuris al la vilaĝo, svingante la vergojn fetorantajn.

— Hodiaŭ estos festo por la katoj. Fiŝ-vespermanĝo ĝis krevo! Kata dimanĉo, haleluja!

— Haleluja, haleluja! — ĥoris la ceteraj.

Eĉ Tupy kriadis kun ili.

\*

Ili vagadis per du bicikloj. Lappar veturigis sur sia biciklo Repon, Nodon veturigis Tupy. Ili atingis la monteton 'Kocor'. Ĉi tie la kampvoĵeto estas tiel kruta, ke eĉ Stefano Ĉuha ne kapablas venki ĝin, kvankam neniu konas pli fortan homon, ol li.

— Ĉiu descendu! — komandis Lappar.

Ili haltis en la sunbrilego.

— Tupy, nun residiĝu kaj veturu sur la monteton — diris Lappar kun insida rideto.

— Tio ne eblas — kontraŭdiris Tupy. — Neniu kapablas veturi ĝis la supro.

Lappar fiksis siajn ladkolorajn okulojn al Tupy.

— Ek, antaŭen. Mi venos tuj post vi, kaj se vi haltos, mi surpasos vin. — Kaj lia minacanta mieno pruvis, ke li ne ŝercas.

Tupy kapitulacis. Li ekiris.

— Vi restu ĉi tie — ĵetis la vortojn Lappar al Repo kaj Nodo — sed eĉ moveton mi ne vidu, ĉar hodiaŭ mi estas danĝera.

Tion dirinte ankaŭ li ekis al la monteto.

— Klopodu, Tupy, ĉar mi venas! Klopodu, se vi volas savi la vivon! Klopodu, alie mi mortpremos vin! — kriegadis Lappar.

Tupy obeis. Liaj dentoj grincis. Ekveturinte tuj li sentis, ke neniam li kapablos atingi la supraĵon. Poste ĉio ruĝiĝis antaŭ liaj okuloj. Poste li pensis, ke prefere li haltos, lasos sin mortpremi, ŝajne hodiaŭ li devas pereii neeviteble. Poste tamen li atingis la supraĵon. Ankaŭ Lappar tuj post li.

— Brave, Tupy! Bravege! — laŭdis lin Lappar kun sarkasma ridaĉo. — Nun ekiru reen, ni kunportos ankaŭ la ceterajn.

Tupy ne povis eĉ respondi. Li ekruliĝis malsupren per sia veturilo.

Repo kaj Nodo sorĉite gapis la proksimiĝantojn, kies ĉemizo estis malseka kaj kies vizaĝo estis kovrita de ŝvito, kiel tiu de la malliberuloj, kiujn ili kaŝrigardis en la ŝtonminejo.

Tupy forpuŝis la biciklon kaj sternis sin teren. Ankaŭ Lappar haltis. — Mi estas la Demona Estrego! Tupy, vi estas la vicestro. Repo kaj Nodo, vi estas la soldatoj. Tupy, nun ek antaŭen, kunportu Repon. Mi portos

Nodon, tuj malantaŭ vi. Se vi haltos, mi mortpremos vin.

— Mi faros nenion — diris Tupy sen forto. — Prefere mi mortaĉos tuj, ĉi tie. Mortpremu min tuj, ĉi tie.

Li ĵetis sin dorsen, disetendante la brakojn.

Lappar fiksis siajn okulojn al li. Lia rigardo estis flamo. — Ekiru, mi ordonas!

— Ne kaj ne! — skuis la kapon Tupy elĉerpita, kuŝante inter la herboj.

Lappar eltrovis ion novan: — Vi estas la vicestro.

Ekiru sola! Mi sidigos Repon antaŭ min sur la biciklon, Nodon malantaŭ min, sur la pakajlokon, kaj ni venos post vi. Hodiaŭ mi estas timegenda kaj neebla.

La ceteraj obeis, kvazaŭ narkotitaj pro la perforto.

Tupy rezignante ekveturis, Lappar sekvis lin kun sia duobla ŝarĝo. Ĉi-foje li ne kriadis. Stertorante li spiris, liaj okuloj cirkulis freneze, liaj lentugoj brilis



sub la ŝvito, kiel ardaĵoj. Neniu kredis, ke ili transvivos la aferon, tamen ili alvenis sur la supro. Tiam la pulmo de Lappar jam ŝiradis la aeron kun ŝrikanta spirego. Nun li ĵetis sin dorsen, liaj okuloj rigidiĝis, kaj li fariĝis senvorta por kelka tempo. La ceteraj ĉirkaŭstaris lin sorĉitaj.

Poste Lappar ekparolis. Mallaŭte kaj raŭke: — Mi estas la Antikristo. Jen, mi pereas. Sed antaŭ mia morto mi faras mian testamenton. Aŭskultu min, ĉar mi volas, ke ĉio estu tiel post mia morto. Miajn okulojn ne fermu. Kun malfermite rigidiĝintaj okuloj mia kadavro estu portita sur la promontoron. Repo, al vi mi testamentas la vilaĝon. Nodo, via estos la arbaro. Tupy, viaj estos la rivereto kaj la fiŝoj. Se mi jam estos sur la promontoro, Repo, vi bruligu la vilaĝon. Estu tiam nokto kaj bruligu ĉiun domon unuope. Nodo, vi bruligu la arbaron. Ĉiun arbon kaj

arbuston unuope. Tupy, vi bruligu la rivereton kaj la fiŝojn...

Tupy volis interrompi lin konsternigante, sed Lappar ne lasis.

— ... se la Antikristo mortas, tiam eĉ la akvoj povas bruli. — Li spiradis iom, poste daŭrigis. — Se jam brulos ĉio, vi ĉiuj kolektiĝu sur la promontoro kaj tranĉu vian gorgon. En mia morto mi volas vidi per miaj nefermitaj okuloj ĉion flamanta kaj sanganta. — Tion dirinte li endormiĝis.


La ceteraj kaŭris ĉirkaŭ li kun timego.

— Ĉu li jam mortis? — demandis susurante Repo.

— Ne. Aŭskultu. Li spiras ankoraŭ. — Tupy respondis tion, la vicestro.

Ili silentis longe, tre, tre longe, ĉar jam krepuskiĝis, kiam la okuloj de Lappar malfermiĝis.

— Jen la morto! — ili pensis ĉiuj kun teruro, sed ne, ĉar Lappar sidleviĝis, mezuris ilin per rigardo kaj diris:



— Timu kaj tremu, ĉar mi estas la Demonulo! Timu kaj tremu, ĉar vi estas ĉiuj fatrasoj.

\*

— Hodiaŭ ni ŝtelos melonojn — diris Lappar.

— Neeble — diris Tupy. — La kampgardistoj havas fusilojn, ŝargitajn per salo.

— Tamen ni ŝtelos — diris Lappar, iom malpli memfide. Ili sidadis plu senvorte.

Lappar suprenrigardis al la nuboj: — Tuj pluvos. En pluvo mi ne volas melonojn. Ni ne bezonas melonojn. Prefere ni ŝtelu fusilojn kaj pistolojn. Pistolojn por Repo kaj Nodo, ĉar ili estas soldatoj. Tupy, vi ricevos fusilon, ĉar vi estas la vicestro. Ankaŭ mi havos fusilon, sed pli grandan, ol vi. Poste ni kunpelos la kampgardistojn kaj mortpafos ilin. Ĉiun melongardiston kaj Alekson Piron. Mi ekstermos ilin, ĉar mi

estas la Antikristo. Ni starigos ilin vice ĉi tie antaŭ la muro — daŭrigis Lappar. — Mi diros al la unua: 'Surgenuiĝu kaj petegu por via vivo. Se vi petegos bele, vi povos forkuri.' Sed vane li petegos kiel ajn bele; mi ekparolos: 'Pafu!', kaj ni mortpafos lin. Poste mi diros al la sekva gardisto: 'Se vi petegos pli bele, ol la unua ĉi tie, tiam vere vi povos foriri'. Sed li petegu kiel ajn bele, ni mortpafos ankaŭ lin. Kaj en bela vico ĉiujn. Fine sekvos Alekso Piro. Mi diros al li: 'Surgenuiĝu kaj, se vi petegos pli bele, ol tiuj ĉi, certe vi estos la sola, kiu liberiĝos'. Tiam li surgenuiĝos kaj komencos. Mi komandos: 'Petegu pli bele!' Tiam li petegos pli bele. Mi postulos denove: 'Ankoraŭ pli bele!' Kaj li petegos jam tre bele. Tiam mi diros: 'Ĉio, kion vi diris, estas bagatelaĵo, vi forgesis ploreĝi, cetere vi estas fatraso kaj malbravulo'. Kaj mi diros: 'Pafu!', kaj ni mortpafos ankaŭ lin.

La ceteraj aŭskultis lin kun abomeno. Kia kulpo povas ŝargi la animon de Alekso Piro, per kiu li meritis tiel teruran morton?

— Tupy, ekiru kaj rabu fusilojn. Se vi ne akiros fusilojn ĝis vespero, ankaŭ vi estos mortpafita. — Lappar eksilentis kaj profundigis en meditado. Ĉar, se Tupy ribelos kaj ne ŝtelos fusilojn, tiukaze per kio li estos mortpafita?

Poste Lappar komencis pensi pri aliaj aferoj.

— Tamen ne. Mi ne bezonas fusilojn. Prefere ni ŝtelos vinon. Ni ŝtelos vinon kaj ni ebriiĝos. Ni diboĉados kaj faros ekscesaĵojn. Mi scias, kiamaniere oni povas ŝteli vinon. Mi ŝtelrigardis, kiel faras tion la liveristoj. Nodo, via patro estas ĉarpentisto. Iru hejmen kaj ŝtelu drilon. Repo, vi rabu pumpilon de biciklo. Tupy, venu kun mi, ni trarompos la kelpordon.

Sed ili ne devis trarompi ĝin. La kelpordo ne estis fermita. Ili ŝteliris en la obtuzan malhelon kaj ĉirkaŭ-okulumis. Lappar subite kriis al Tupy: — Kial vi gapadas ĉi tie? Mi vidas nenion. Forkuregu kaj ŝtelu kandelon. En malhelo mi ne volas vinon.

Tupy forkuris, sed post nelonge li revenis, kaj tiam alvenis ankaŭ la ceteraj.

Lappar komencis la laboron. Li boris maldikan truon en la barelo, sed vino ne venis el ĝi.

— Malplena — konstatis Tupy.

— Ne babilaĉu, ĉar mi arestigos vin! — kriis Lappar. Li prenis la pumpilon, kiun alportis Repo, kaj li pumpis iom da aero tra la trueto. Poste li surgenuiĝis, kaj almetante la buŝon al la truo, komencis suĉi la vinon. Kiam la soldatoj revenis, alportante ladan gamelon, Lappar jam denove pumpis. Ili metis la gamelon sub la maldikan fluon, kaj almenaŭ ĝi pleniĝis.

— Tupy, tio estas la via, ĉar vi estas la vicestro. El-trinku ĝin ĝis fundo.

Tupy malinkline komencis glutadi.

— Vice ĉiu ricevos unu gamelon, kaj poste denove po unu ĉiu persono, ĉar hodiaŭ ni diboĉados. Ni ebriiĝos kaj faros ekscesaĵojn.

Ili stumbladis kun kapturno el la kelo eksteren. Jam pluvis.

— Kantu — komandis Lappar.

Fuŝkantante ili amblis laŭ la ĝardendorsa vojo. La griziĝanta pejzaĝo estis senviva kaj trista.

— Nun fosu mian tombon kaj enterigu min vivanta — diris Lappar. — Enterigu min kaj mi elvenos elsub la tero, ĉar mi estas la Demonulo.

Ili diskuris akiri fosilojn.

— Ĉi tie estu mia tombo — montris Lappar lokon sub granda arbo. — Faru por mi fosaĵon, mi staros en ĝin kaj vi enterigos min staranta, ĉar oni enterigas la Demonulojn ĉiam starantaj. Fosu kaj kantu.

La soldatoj komencis fosi.

— Tupy, foriru kaj ŝtelu por mi trogon. Mi ne volas esti pluv-batata.

Poste li ekzamenis, kiom profunda estas la fosaĵo. Ĝi atingis nur ĝis genuo. Li sidiĝis teren, la ŝtelitan trogon li apogis al sia kapo kiel ŝirmilon kaj senvorte observis la kantantajn tombofosistojn. Ili jam staris ĝis kokso en la tero. Per mangesto li signis: plu. Kiam la fosaĵo atingis jam ĝis la ŝultro, li staris en ĝin. Nun enterigu min! — li donis la komandon.

Ili komencis reŝuti la teron. La malfiksa tero atingis liajn genuojn. — Iu piedpremu ĝin. Tiel malfiksa ĝi valoras neniom.

Tupy saltis en la kavon kaj tretadis ĉirkaŭ la Demonulo. Poste ili daŭrigis la reŝutadon de la tero. Kiam ĝi jam atingis ĝis talio, ili piedpremis ĝin denove. Baldaŭ Lappar estis ĝis la ŝultroj subtere, nur lia kapo kaj liaj disetenditaj brakoj restis super la tero.

— Nun kantu kaj dancu ĉirkaŭ mi. Dancu mian mortodancon ĉar la Antikristo estas enterigita. Dume mi elŝiros min el la tero kaj ni ekscesos senbride kaj freneze, ĉar mi estas la Demonulo.

La pluvo jam falis dense. La ceteraj ebie ekkantis kaj ekdancis. Lappar streĉis sin. Li provis elleviĝi el la tero, per siaj disetenditaj brakoj, sed eĉ moviĝi li ne povis. La ceteraj inside atentis lin. La vizaĝo de Lappar deformiĝis, liaj helkoloraj okuloj sovaĝe cirkulis, pluveroj kaj ŝvito fluis desur lia kapo, sed vanis la klopodo, li ne povis eĉ moviĝi.

Tupy kriis al li, per voĉo nekuraĝa: — Elŝiru vin, Demonulo!

Lappar jam grincigis la dentojn pro la fortostreĉo. La ceteraj daŭrigis la mortodancon. — Haltu! — ekkriis Lappar. — Ĉiu kuru kaj kolektu por mi rubusojn. Kolorigu mian vizaĝon nigra. La nigra vizaĝo donos al mi Demonan forton.

Ili diskuris ridaĉante. Singardeme kaj rifuĝprete unue Tupy ŝmiris la vizaĝon de Lappar per rubusoj. Sed kiam ili konvinkiĝis, ke Lappar ne povas uzi siajn brakojn disetenditajn, ili plikuraĝiĝis kaj ŝmiris la nigran kaĉon pli kaj pli pasie sur la kapon de Lappar. — Mi estas la Antikristo — kriadis tiu — tuj mi elŝiros min el la tero, kaj poste mi elŝiros ankaŭ ĉi tiun arbon



**La ilustraĵoj, kiuj akompanas ĉi tiun rakonton, estas prenitaj el la "Bulteno de la Meksika Unesko-Komisiono".**

kaj per ĝi mi disrompos kaj dispistos vin kaj ĉion, ĉar mi estas la Demonulo!

La ceteraj dancis plu en sovaĝa gajeco, ili ĵetadis al la kapo de Lappar jam ne nur rubusojn, sed ankaŭ koton, kaj Tupy ĵetis al lia vizaĝo eĉ putrintan tomaton. — Elŝiru vin, Demonulo! Vi estas ja la timeginda! Eliĝu el la tero, se vi kapablas.

Lappar jam ne povis eĉ respondi. Nur liaj okuloj cirkulis ankoraŭ, sed liaj brakoj kuŝis apud li elĉerpitaj. — Mi kovras vin per la trogo, por ŝirmi vin kontraŭ la pluvo — kriis la vicestro, kaj la trogo jam estis metita super Lappar.

Jam forte pluvis kaj komenciĝis la vesperkrepusko.

— Ni rulu sur lin rokojn — kriis Tupy — se li estas la Demonulo, li povas disĵeti de si eĉ monton.

Per komuna forto ili alportis grandegan ŝtonon. Poste ili alportis ankoraŭ multe da ŝtonoj, brikoj, kaj ankaŭ rubaĵojn, sterkon, ĉion. La tombo de Lappar finfariĝis baldaŭ.

Unue la soldatoj ŝteliris for.

Tupy kantaĉis ankoraŭ iom, ebie sidante sub la arbo, sed poste ankaŭ li stariĝis. — Elŝiru vin, Antikristo! — li kriis, sed nur duonvoĉe, kaj ankaŭ li ektrotis hejmen. Li sentis malbonan guston en la buŝo, pro la vino, kaj li sentis seniluziigon. 'Tiu Lappar estis fatraso. Ni estus devintaj likvidi lin jam pli frue' — li pensis kaj haltis kun subita ektimo.

La tero moviĝis kaj aŭdiĝis bruego. Kun teruro li hezitis, sed nur momenton. 'Nenio! Oni faras eksplodon en la ŝtonminejo' — li pensis. — Morgaŭ ni iros tien kaj ŝtelrigardos la malliberulojn.

Endre Tóth

## Mongolio

• Laŭ informoj ricevitaĵoj pere de japano, kiu en aŭgusto vizitis la ĉefurbon Ulan-Bator, Mongola Esperanto-Unuiĝo (Poŝtkesto 733, Ulan-Bator) havas 40 membrojn. Ĝia prezidanto estas d-ro Lubsangĝab, kaj la sekretario Dogsuren. Laŭ deklaro de la sekretario, MEU nun okupiĝas pri kompilado de Esperanta-mongola vortaro kaj sentas gravan mankon de Esperantaj materialoj.

## Ĉeĥoslovakio

• "Pri la lingvo de estonto" nomiĝas 700-vorta artikolo de O. Kníchal, publikigita en la ĉefa ĉeĥoslovaka ĵurnalo *Rudé právo* la 31an de julio ĉi-jare.

## Venezuelo

• Post tre sukcesa prelegciklo en la Centra Universitato de Venezuelo (prelegis: Bachrich, J. Mosonyi, O. de Diego), en la sama universitato en Caracas komenciĝis Esperanto-kurso, kiun gvidis prof. J. Mosonyi por 20 studentoj, el kiuj 16 finis la 4-semajnan kurson, gviditan laŭ speciale prilaborita materialo de la angla lingva lernilo *Teach Yourself Esperanto*. Pli frue en la jaro (fine de marto) venezuela televido montris 15-minutan intervjuon pri Esperanto kun Lino Moulines.

## Sud-Afriko

• En julio ĉi-jare, la ĉefdelegito de UEA en Sud-Afriko, C. Beckford, estis intervjuita pri Esperanto en la landa radio. Samtage oni intervjuis ankaŭ ges-rojn Schilperoord el Britio, kiuj troviĝis vizite en Sud-Afriko. Tri tagojn poste, en pluraj gazetoj aperis ampleksaj artikoloj pri la Internacia Lingvo kaj ges-roj Einiho-

vici el Aŭstralio, kiuj estis survoje al "Bona Espero" en Brazilo. Sekvis tuta lavango da informpetoj, kaj la ĉefdelegito opinias, ke tio estis la plej grava semajno por Esperanto dum la lasta jardeko en tiu lando. Kompreneble, tuj komenciĝis ankaŭ Esperanto-kursoj.

## Soveta Unio

• En kvar grandaj feriaj aranĝoj dum la lastaj monatoj, partoprenis ĉ. 700 sovetaĵ esperantistoj. Oni notis, ke la organiza, lingva kaj kultura nivelo de la aranĝoj daŭre plialtiĝas.

# Fake

## Interlingvistiko

• La Instituto por Kibernetika Pedagogio en Paderborn, FR Germanio, organizas konferencon pri la rolo de interlingvistiko en la pedagogio, lingvo-kibernetiko kaj scienca komunikado. La konferenco okazos inter la 24a kaj 28a de novembro, en la Esplorcentro Paderborn (Rathenaustrasse 69-71, D-4790 Paderborn).

## Seminarioj

• Inter la 30a de oktobro kaj la 5a de novembro 1976, en la sidejo de la Informcentro de Unuiĝintaj Nacioj en Romo, okazos seminario pri la temo "Lingva demokratio". La seminarion organizas Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, kunlabore

kun loka grupo de aktivuloj kaj kun financa subteno de la Eŭropa Junulara Fonduso. Tiu subvencio ebligas (parte aŭ tute) repagon de kostoj al junaj partoprenantoj el mediteraneaj landoj. Pliajn informojn oni petu ĉe: d-ro R. Corsetti, Via Strabone, 1, I-00176 Roma, Italio.

## Terminologio

• La Terminologia Centro de ISAE aranĝas publikan diskuton por klarigi kial iuj fakuloj uzas la terminon **komputilo**, aliaj preferas **komputero**, pliaj voĉdonas por **komputoro**, kaj kelkaj proponas la terminon **komputro**. Por ricevi cirkuleron pri la diversaj argumentoj kaj voĉdonilon (la voĉoj de fakuloj ricevos pli da poentoj), skribu al: TC de ISAE, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado, L5H 3N6. Krome, la Centro serĉas fakulon, kiu povus kritike kontroli difinan vortaron pri **mikroba kaj molekula genetiko**, verkitan de Ralph A. Lewin.

## Literaturo

• En la internacia literatura konkurso "Larius", organizita jam la duan fojon en Italio, ĉi-jare la premiojn por originala poezio gajnis: 1. K. Piĉ (Ĉeĥoslovakio), 2. J. Kořínek (Ĉeĥoslovakio), 3. A. Goodheir (Skotlando), 4. K. Aleksova (Bulgario) kaj 5. L. Pavlova Koleva (Bulgario). Premiojn por aperintaj poemvolumoj oni donis al: 1. W. Pilger (Nederlando, por *Ne ĉiam*), 2. D. Lister (Britio, por *Ĝis nun*), 3. C. Conterno (Italio, por *Eta vivo*), 4. K. Walraamoen (Norvegio, por *Ni devas vivi*), 5. L. Gabrielli (Italio, por *Ni devas vivi*).

# Abonservo de UEA

Por raciigi la peradon de abonoj la Abonservo de UEA ne plu akceptos ekde la 1-a de novembro 1976 mendojn de aliaj perantoj por periodaĵoj ne eldonataj de UEA. Tio signifas, ke ĉiu abonperanto estonte bonvolu rekte rilati kun la koncerna eldonejo. Krome, la Abonservo anoncas jenajn novajn prezojn de la eldonaĵoj, kiujn peras UEA (v. en la Jarlibro 1976, p. 369-378):

|                            |      |      |                             |       |
|----------------------------|------|------|-----------------------------|-------|
| <i>Boletín</i>             | gld. | 9,65 | <i>Kvakera esperantisto</i> | 12,20 |
| <i>L'Esperanto (itala)</i> |      | 8,10 | <i>Literatura Foiro</i>     | 12,20 |
| <i>Homo kaj kosmo</i>      |      | 6,80 | <i>Norvega esperantisto</i> | 9,80  |
| <i>Juna Amiko</i>          |      | 5,70 | <i>Oomoto</i>               | 12,20 |
| <i>Kalejdoskopio</i>       |      | 5,30 | <i>Paco</i>                 | 11,15 |

Bonvolu ankaŭ noti, ke *Internacia pedagogia revuo* ĉesigis nian peradon. Kiel kutime, nederlandaj abonantoj aldonu al la supraj prezoj 4% por la enlanda imposto.

## Lingva problemo


- La Asocio pri Internaciaj Studoj, grava usona faka organizaĵo, pri-traktos dum sia konferenco en Saint Louis, en marto 1977, interalie la temon "Lingvaj baroj kiel monda politika institucio: Kiu komunikas kion, kiam, kiel?". La tiuteman sesion prezidos prof. d-ro Jonathon Pool, aganta direktoro de CED kaj komitatano de UEA. La podian diskuton partoprenos i.a. pluraj konataj universitatanoj-esperantistoj.

## Politiko

- En la skizo de la nova programo de la dana Progres-partio troviĝas rekomendo, ke ĉiuj infanoj de la mondo estu kapabligitaj paroli kaj skribi en Esperanto ekde la aĝo de 12 jaroj.

## Volontuloj

- La Volontula Servo de UEA surprizas per siaj populariĝo kaj efika helpo, kiun ĝi liveras — ĝis nun — ĉefe al la C.O. de UEA, kvankam la



utiligo de la Servo estas proponita ankaŭ al aliaj movadaj instancoj. Fine de aŭgusto Roterdamon forlasis kanada studento Bruce Crisp (sur la foto), kiu ekde februaro sukcese prizorgis la funkciadon de la Libroservo de UEA. Kvazaŭ stafete, la saman grandan laboron — temas ja pri stokoj de ĉ. 2000 diversaj libroj kaj aliaj varoj — transprenis juna italo Giulio Cappa. Al liaj kvalifikoj por unujara prizorgado de la plej granda libro-servo en la Movado apartenas ankaŭ lia doktoreco pri la moderna itala literaturo. La laboro en Roterdamo

ebligas al d-ro Cappa detalan konatiĝon kun la literaturo en la Internacia Lingvo.

## Radioamatoroj

- Post la lastatempa vizito de Torben Kehlet al Brazilo (v. ankaŭ p. 159), ŝajne por la unua fojo realiĝis radioamatoraj kontaktoj de esperantistoj el Sud-Ameriko kaj Eŭropo. La 1-an de aŭgusto, Esperanta konversacio fluis tra la etero super Atlantiko dum pli ol unu horo. PT 2 GYS el Brazilo sukcesis kontakti

Danlandon, Francion kaj Germanion. Interesitoj notu, ke regulaj radioamatoraj konversacioj inter Brazilo kaj Eŭropo okazas ĉiudimanche je la 17a horo laŭ la greniĉa tempo, en unuopaj flankobendoj (SSB), je la frekvenco de 14266 kHz.

## Turismo

- La urba turisma oficejo de Luksemburgo, kunlabore kun la tiea Esp. asocio, eldonis tre plaĉan koloran prospekton "Malkovru Luksemburgon, la verdan koron de Eŭropo".

# Persone

## Morariu

- Tiberio Morariu, unu el la plej konataj Cseh-metodaj instruistoj en pluraj landoj, iama ĉefdelegito de UEA en Rumanio, sindiko de Sveda Esperanto-Federacio, festis la 28an de septembro 75-jaran datrevenon kaj 55 jarojn de aktiveco en la Movado.

## Blanke

- Detlev Blanke, sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en Germana Demokratia Respubliko kaj unu el la tri direktantoj de CED (aliaj du estas d-roj Lins kaj Pool), meze de junio ĉi-jare doktoriĝis en Humboldt-Universitato en Berlino per disertacio pri kompara lingvistiko kaj esperantologio. Pri la enhavo de la disertacio ni raportos pli detale en unu el niaj sekvantaj numeroj.

## Goodheir

- Internacia ĵurio (R. Bernard, C. Conterno, A. Fighiera-Sikorska, D. B. Gregor kaj E. Lapenna) proklamis la skotan poeton Albert Goodheir "Aŭtoro de la jaro 1975" en tiurilata konkurso de la literatura rondo "La Patrolo" (v. nian numeron de februaro, p. 36). La distingon al Goodheir portis i.a. la originala poemaro *Merlo sur menhiro* kaj la tradukoj de *Bakĥantinoj* (Eŭripido) kaj *Forkaptita* (R.L. Stevenson).

## Gregor

- Verŝajne ne estas vaste konate, ke akademiano D.B. Gregor (Britio) apartenas al la malgranda rondo de specialistoj pri pluraj nun apenaŭ

vaste uzataj italaj regionaj lingvoj. Lastatempe en Kembrigo aperis lia anglalingva traduko de *Pulon Matt* (Frenezna Nap), poezia ĉefverko de Romanja, regiono entenantanta la urbojn Ravenna, Rimini, Cesena, Forlì kaj Faenza. Gregor estas aŭtoro ankaŭ de ampleksaj verkoj pri la romanjola kaj friula lingvoj kaj literaturoj.

## Kořínek

- La 1-an de oktobro fariĝas 70-jara Jiří Kořínek, elstara nomo en la Esperanta literaturo, originala kaj traduka. Kvankam li aktivas en la Movado ekde 1922, lia literatura debuto okazis nur en 1949 kiam aperis liaj unuaj poemoj. Malgraŭ plurfoja premiigo en la Belartaj Konkursoj



de UEA kaj en aliaj internaciaj konkursoj, Kořínek ankoraŭ ne havas presforman poemvolumon. Tamen, aperis liaj tradukoj *Panjo* kaj *Kronplekto da sonetoj* (ambaŭ de J. Seifert) kaj *Sileziaj kantoj* (Bezruč), la lasta kunlabore kun Pumpr kaj Hromada. Ses poemcikloj kaj pluraj tradukaj volumoj ankoraŭ atendas eldoniston.

## JOEL VILKKI

Meze de julio ĉi-jare, forpasis Joel Vilkki (1900-1976), unu el la plej elstaraj figuroj en la finna Esperanto-movado dum la lastaj jardekoj. Li estis ĉefdelegito de UEA (IEL) de 1937 ĝis 1971, dumviva membro, kaj en la lastaj 15 jaroj membro-subten-



anto. Kiel rektoro de porinstruista lernejo, li ebligis la konatan eksperimenton en Somero (1958-1963), kie oni studis la pedagogian valoron de la Internacia Lingvo (v. nian revuon, marto 1974, p. 43). Li verkis artikolojn kaj informajn broŝurojn pri Esperanto. Lia estas ankaŭ la nuntempe uzata vortaro *Suomi-Esperanto-Suomi* (1973).

## MARC BUDIMIR

Revenante de la 61a UK en Ateno, la 3an de aŭgusto mortis en trafik-akcidento en Greklando, Marc (Svetomir) Budimir (1929-1976). Li estis franco jugoslavdevena, kaj aktivis en la Movado ekde 1952, unue en Beogrado, kaj poste en Liono, kie li vivis dum la lastaj dudek jaroj.

## MILOŠ LUKÁŠ

En Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio, la 26an de aprilo mortis prof. Miloš Lukáš (1897-1976), honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, dumviva membro de UEA. Lukáš lernis la Internacian Lingvon jam en 1907 (li mallonge okupiĝis ankaŭ pri Ido) kaj rapide elkreskis en eminentan tradukiston el la ĉeĥa kaj slovaka lingvoj. Tamen, libroforme aperis nur *Nokto en Karlův Týn* (1921) de J. Vrchlický. La tradukoj de Lukáš — la lasta el tiu granda tradukista skolo

al kiu apartenis ankaŭ Pump kaj Ginz — restas disŝutitaj tra preskaŭ ĉiuj kulturaj periodaĵoj, kiuj dum la lastaj sesdek jaroj aperadis en Esperanto. Lukáš, krome, tradukadis ankaŭ el Esperanto kaj kelkaj naciaj lingvoj en la ĉeĥan kaj slovakon.

## JOS VAN DEN EYNDE

La 12an de junio 1976, en Antverpeno, Belgio, forpasis Jos van den Eynde, kiu dum preskaŭ kvindek jaroj aktivis en la Esperanto-movado, precipe loka kaj skolta.

## NORMAN W. VIGAR

En Addlestone, Britio, la 6an de junio forpasis Norman William Vigar (1898-1976), iama vicprezidanto de IKUE, membro de UEA dum 30 kaj fakdelegito dum 20 jaroj.

## EDUARDS DANCIS

Unu el la veteranoj de la Movado en Latvio (Soveta Unio), Eduards Dancis (1897-1976), forpasis la 4an de aprilo.

## HALLGRÍMUR J. JAKOBSSON

En la islanda ĉefurbo, la 16an de marto forpasis Hallgrímur J. Jakobs-son (1908-1976), instruisto pri muziko kaj komponisto, multjara membro de UEA kaj estrarano de la loka Esperanto-societo "Aŭroro" en Rejkjaviko. Post la morto, lia ne-esperantista familio petis, ke oni



kondolencu per subteno de la idealoj por kiuj batalis la forpasinto. Tio rezultigis pli ol 2500 gld. da donacoj al la Islanda Esperanto-Asocio.

## GIUSEPPE CHECCO

Antaŭ kelkaj monatoj forpasis en Triesto (Italio) Giuseppe Checco, kiu estis fervora aganto en la loka Esperanto-movado dum pluraj jardekoj. Li estis membro de UEA ekde 1947.

# Ekzameno

**E** Redaktas:  
Bernard Golden,  
Csikász u. 11.III.3  
H-8200 Veszprém, Hung.

## RESPONDO 4

(pri la demando v. nian junian numeron, p.114)

En la *Aldono al la Dua Libro*, Zamenhof klarigis, ke li ŝanĝis la formojn de la originalaj korelativoj de tempo, **ian**, **ĉian**, **kian**, **nenian** kaj **tian** je **iam**, **ĉiam**, **kiam**, **neniam** kaj **tiam**, por ke oni povu distingi ilin disde la akuzativaj formoj de la kvalit-adjektivoj **ia-n**, **ĉia-n**, **kia-n**, **nenia-n** kaj **tia-n**. La proponon pri tiu ŝanĝo faris la planlingvisto Edgar von Wahl, kiu esperantistiĝis en 1888.

## DEMANDO 5

(la respondo aperos en nia novembra numero)

La nomo Paŭlo estas sufiĉe ofta vok-nomo, eĉ inter esperantistoj. Kiu bone konas la historion kaj literaturon de nia Movado facile povas listigi almenaŭ dekon da ĉi tiuj sam-nomanoj, kiuj faris valorajn kontribuojn al la Esperanto-kulturo. Se vi ne povas tuj memori pri ili, eble la sekvaj aludoj helpas al vi rekoni kvin el la plej elstaraj Paŭloj.

- El la kvin viroj, kvar naskiĝis en la 19a jarcento kaj unu en la 20a. Nur unu el la kvin nun vivas.
- Inter ili troviĝas la sekvaj profesioj: du presistoj, unu ĵurnalisto, unu kuracisto kaj unu agronomo.
- Du estas parolantoj de la franca lingvo, du de skandinavaj lingvoj kaj unu de finn-ugra lingvo.
- Ĉiuj kvin estis redaktoroj de pli ol unu Esperanto-periodaĵo aŭ kompilaĵo. Tri el ili estis redaktoroj de la dua grava revuo en la historio de Esperanto-ĵurnalismo, *Lingvo Internacia*.
- Ĉiuj kvin estis anoj de la Lingva Komitato aŭ de la Akademio de Esperanto.
- Du familiaj nomoj komenciĝas per la litero N, kaj po unu per B, F kaj L.

N-ro 500, 1976 08 31

## NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

AŬSTRAL: E. Gibson. KAN: M.-T. Bourbeau. NED: M. van Bentum-van der Broek.

## SOCIETO ZAMENHOF 1976

IT: 182 A. Lacalendola. JAP: 183 S. Kato. US: 184 Moshe Lewin. BELG: 185 C. Peeters. DAN: 186 E. Kehlet. FINN: 187 I. Klemola. FR: 188 R. Jossinet. NED: 189 H. Boersma-Hoekema; 190 W. Drees; 191 B. Kappert. NOR: 192 R. Bugge-Paulsen. SVE: 193 T. Fors. US: 194 J. Pool. KAN: 195 K. Crockett. US: 196 M.L. Barkley; 197 J.L. Regal; 198 M. Starr. NED: 199 A.J.M. de Jager. SVE: 200 Å. Ericson; 201 Ingrid Johansson.

## SOCIETO ZAMENHOF 1977

US: 001 M. Starr.

## NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas ĉi-sube la nomojn de la nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1976 12 15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

ARG: Luis Vicino, FD (filatelo), Buenos Aires; Hugo A. Lingua, D kaj FD (instruado de Esperanto), Rosario. AŬSTRAL: Douglas Thorp, FD (fotografio, komputeroj, meteorologio), Perth. BRAZ: Nid Dutra d'Amorim, D kaj FD (amatora radio), Brasilia. DAN: André Skovrind, D Jyderup; Torben Kehlet, FD (amatora radio), København. FINN: Osmo Buller, JD Oulu; Heta Kesälä, FD (komputeroj, turismo), Tuusula; Annikki Rannisto, D Tampere. FRANC: André Cherpillod, FD (lingvoj), Parizo; Hervé Gonin, D Douai. FRG: Hans-B. Welling, FD (amatora radio), Meerbusch; Hans Gunkel, FD (naturenergio, naturprotektado, sociaj sciencoj), Bamberg-Bug. HUNG: András Horváth, D kaj FD (fertornado), Tiszavasvári; István Ragoncza, FD (domkonstruado, tabakfabrikado), Budapest; Ilona Bozorády, D kaj FD (turismo), Sárospatak. IRANO: Badiollah Samimy, D Teheran. ISL: Stefán Sigurdsson,

FD (popolmuziko), Reykjavík; Arni Bödvarsson, FD (islanda lingvo kaj lingvistiko), Reykjavík. ISR: Amri Wandel, FD (fiziko), Tel-Aviv. ITAL: Alberto Busato, FD (elektroniko, lingvistiko), Cesena; Gianfranca Taddei Braschi, FD (instruado de Esperanto), Cesena. JAP: Joŝiki Tacumi, D kaj FD (elektroniko kaj komputeroj), Kusatu; Hirokazu Doi, D Yokohama; Bebson Takata, FD (radiologio), Tokyo. KAN: Takeo Sakuma, FD (ekologio, kemio), Downsview. NOR: Olav Reiersøl, FD (matematiko), Oslo. PORT: Gabrielo Pausback, D kaj FD (turismo, kristanismo romkatolika), Fatima. RUM: Mihail Popescu, FD (kuracplantoj, radioamatorismo), București; Ernest Schlesinger, D kaj FD (filatelo), Cluj-Napoca. SOV: Asen Ivanov Dočev, D kaj FD (elektro- kaj radio-tekniko, mekanikigo/konstruado, turismo), Ŝeleznogorsk. SVED: Ingvar Eriksson, D Falköping. SVIS: Odette Fregonara-Jeanneret, D Genève. US: Patricia Egan, JD kaj FD (dancarto kaj moderna baledo), San Francisco; James Cool, D kaj FD (literaturo), Wilmington; William J. Ford, D Mount Laurel; Brian Burg, D, JD kaj FD (estontecologio, Espermenso, psikologio), Garden Grove; Bonnie Helmuth, D kaj FD (librotenado), San Diego.

## NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1976:

ACOR: Silveira. ARG: Córdoba. AŬSTRAL: Redcliffe. AŬSTR: Leoben. BELG: Barchon; Jupille; Millen; Bersillies-l'Abbaye. BRAZ: Alto Paraíso, la FD (psikologio); Bauru, la FD (bio-ritmologio); Campos, la VD; Curitiba, la VD; Feira de Santana; Fortaleza, la FDoj (fotografio, juro, kontoscienco, religio); Londrina; Limoeiro do Norte;

Pompéu; Rosário do Sul. BRIT: Addlestone; Barrow-in-Furness; Blackpool; Glasgow, la FD(klimatizo); Halifax, la D; Ilford; Kingston upon Thames; Long Eaton; Norwich, la D; Urmston; Wolverhampton, la VD. BULG: Sofio, FD (kooperativismo); Stanke Dimitrov; Târgoviște, la VD; Varna, la VD. ĈEĤOSL: Handlová; Havlíčkův Brod; Hradec Králové, la D; Litomyšl, la FD (religio); Opava, la D; Teplice v Č; Vsetín, la FD. DAN: Espergaerde; Karise; Mundelstrup; Rutsker. FINN: Somero; Tampere, D kaj VD; Turku, la VD. FRANC: Angoulême; Arras; Caen; Caudry; Châteauroux; Colmar; Enghien-les-Bains; Houdain; Le Mans, la D; Limoges, la D; Lisieux; Loctudy; Moulins; Nice, la D kaj la FD (rotario); Reims; Saint-Aubin-lès-Elbeuf; Saint-Mandé; Vire. FRG: Berlin, la VD; Bochum, la D; Braunschweig; Dietramszell; Dollbergen; Giessen/Lahn; Leinfelden-Oberaichen; Neustadt/Weinstrasse, la D; Nürnberg, la FD (SOS-aŭto-servo); Wiesbaden, la VD. GDR: Halle. GREK: Patras. HISP: Aldaya; Barcelona, FDoj (filozofio, naturismo, religio: evangelia kristanismo); Catarroja; El Ferrol del Caudillo; Los Llanos de Aridane; Santa Cruz de la Palma; Tarrasa, la FD (kokinbredado). HUNG: Budapest, FDoj (kuirarto, muziko); Pécs, la FD (muzeoj). IRAN: Teheran. ISR: Gvaram; Hajfa, la JD. ITAL: Bologna, la FD (komerco); Casalecchio di Reno; Costa Vescovato; Firenze, la FD (fotografio); Grosseto, la FD (ekonomio: komerca); Napoli, la FD (muziko); Sarezzano, la FD; Torino, la FDoj (astronomio, turismo); Trieste, la D kaj la FD (sporto). JUG: Beograd, la FD (asekuro socia); Bled; Kapele če Brežice; Koprivnica, la FD (sennacismo, stenografio, intersteno). KAN: Surrey. KOR: Seoul, la JD. MEKS: México, la D. NED: Arnhem, la D kaj la FD(PTT); De Bilt; Eindhoven, la FD (turismo); Haarlem. NOV-ZEL: Auckland, la FD (folkloro); Lower Hutt, la VD. POLL: Bydgoszcz, la FD (ĵurnalismo); Gdynia; Jelenia Góra; Komorno k/Koźla; Kraków, la D kaj la FD (historio pola); Poznań, la FD (juro); Opole; Racibórz; Sosnowiec,

**VI HELPOS LA LABORON DE LA CENTRA OFICEJO DE UEA, SE VI ĜUSTATEMPE PAGOS VIAN KOTIZON POR LA JARO 1977. VI POVAS PAGI REKTE AL LA C.O., SED ESTAS PREFERINDE FARI TION TRA LA PERANTOJ.**

la FD; Stargard. PORTORIKO. REŬ-NIO. RUANDO. SOV: Omsk; Rostov-Don, la FD (instruado: Esperanto); Törva. SVED: Falköping; Karlshamn; Karlskoga, la FD (turismo); Kimstad; Mora; Östanstjö, la D; Skövde, la FD (konstruado); Uppsala, la D; Vingåker. SVIS: Bern, la D; Genève, la VD; Giubiasco, la FD; Neuchâtel, la FD (edukado, mastrumad-instruado). US: Ames; Baltimore, la D; Bellaire; Chicago, la FD (turismo aeroplana); Daly City; Houston, la D kaj la FD (inĝenierado, popoldancado); Las Vegas; Lexington; Middleton; Oakland; Phoenix; Piedmont; San Antonio, la VD; San Diego, la D; Saint Paul; Universal City; Warren (Ohio); Warren (Pennsylvania).

### DONACOJ 1976 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Kanado: Dorothy Henderson 2 812,00. Sumo ĝisnuna 9 594,48.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 51,68. Sumo ĝisnuna 688,56.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: Laurie Lempinen 317,00. FR Germanio: Bruno Vogelmann 500,00. Instituto Hodler 68: 3 000,00. Nederlando: Frisa Esperantista Rondo 38,00. Svedio: Henry Almar 49,00. Usono: Petras M. Urbaitis 24,75. Sumo ĝisnuna 4 929,27.

ELDONA FONDAĴO: Japanio: Niwa Masahisa 9,50. Sumo ĝisnuna 9,50.

FINANCA PROGRAMO DE LA ESPERANTO-MOVADO: Anonime 26 702,50. Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio 6 000,00. Sumo ĝisnuna 54 104,25.

ĜENERALA KASO: Memore al Leo Jolliet 84,86. Anonime 20,00. Esperanto-Ligo Filatelista 3,90. Aŭstrio: S. Stamm 8,00. Brazilo: H. Fontoura Aderne 25,05. Finnlando: Liisi Oterma 40,00. Francio: Robert Wilhelm 11,45. FR Germanio: Louis Beaucaire 44,80; Josef Eder 100,00; Adolf Mosch 13,28; G. Ritterspach 10,59; Kurt Schönrich 59,67. Japanio: Esperanto-Ligo de Hokajdo 255,00. Nederlando: S.P. Duin 3,76; J.O. Hoekstra 1,50; F.H. Kat 30,00; G. Simonides 2,52; R. Slot 5,00. Svedio: Erik Carlén 242,03; Jim Hornö 5,50; H. Södergren 36,75. Usono: Mary Kutz 67,13; Harry I. Weiner 51,02. Sumo ĝisnuna 4 065,78.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

# Kotiztabelo 1977

Kvankam la baza guldена kotizo por 1977 ne ŝanĝiĝis, okazis tamen pluraj aliaj ŝanĝoj rilate la kategoriojn de la individua membreco kaj alĝustigojn de la kotizoj en naciaj valutoj. Tial estas konsilinde, ke oni, antaŭ ol pagi sian kotizon por la venonta jaro, atente trastudu ĉi tiun tabelon.

| Valuto<br>Landa | Asociaj<br>AM | Individuaj<br>MJ(-K) MA(-K) | SA<br>"Eo" | Kto-<br>abono | SZ-<br>aldono | AerR-<br>aldono |       |
|-----------------|---------------|-----------------------------|------------|---------------|---------------|-----------------|-------|
| Argentina       | 30            | 600                         | 1500       | 900           | 450           | 3000            | 500   |
| Aŭstralia       | 0,30          | 6,00                        | 15,00      | 9,00          | 4,50          | 30,00           | 5,80  |
| Aŭstra          | 7,20          | 144                         | 360        | 216           | 108           | 720             | —     |
| Belga           | 15            | 300                         | 750        | 450           | 225           | 1500            | —     |
| Brazila         | 3             | 60                          | 150        | 90            | 45            | 300             | 50    |
| Brita           | 0,20          | 4,00                        | 10,00      | 6,00          | 3,00          | 20,00           | —     |
| Bulgara         | 0,48          | 9,60                        | 24,00      | 14,40         | 7,20          | 48,00           | —     |
| Ĉeĥoslovaka     | 6             | 120                         | 300        | 180           | 90            | 600             | —     |
| Dana            | 2,32          | 46,40                       | 116        | 69,60         | 34,80         | 232             | —     |
| Finna           | 1,50          | 30                          | 75         | 45            | 22,50         | 150             | —     |
| Franca          | 1,84          | 37                          | 92         | 55            | 28            | 184             | —     |
| FR-germana      | 1             | 20                          | 50         | 30            | 15            | 100             | —     |
| Greka           | 10,40         | 208                         | 520        | 312           | 156           | 1040            | —     |
| Hispana         | 25            | 500                         | 1250       | 750           | 375           | 2500            | —     |
| Hungara         | 7,20          | 144                         | 360        | 216           | 108           | 720             | —     |
| Irlanda         | 0,20          | 4,00                        | 10,00      | 6,00          | 3,00          | 20,00           | —     |
| Islanda         | 65            | 1300                        | 3250       | 1950          | 975           | 6500            | 608   |
| Israela         | 3             | 60                          | 150        | 90            | 45            | 300             | 33    |
| Itala           | 320           | 6400                        | 16000      | 9600          | 4800          | 32000           | —     |
| Japana          | 116           | 2320                        | 5800       | 3480          | 1740          | 11600           | 1595  |
| Jugoslavia      | 6             | 120                         | 300        | 180           | 90            | 600             | —     |
| Kanada          | 0,38          | 7,60                        | 19,00      | 11,40         | 5,70          | 38,00           | 4,18  |
| Meksika         | 4,80          | 96                          | 240        | 144           | 72            | 480             | 52,80 |
| Nederlanda      | 1             | 20                          | 50         | 30            | 15            | 100             | —     |
| Norvega         | 2             | 40                          | 100        | 60            | 30            | 200             | —     |
| Nov-Zelanda     | 0,36          | 7,20                        | 18,00      | 10,80         | 5,40          | 36,00           | 6,93  |
| Perua           | 19,20         | 384                         | 960        | 576           | 288           | 1920            | 317   |
| Portugala       | 8,80          | 176                         | 440        | 264           | 132           | 880             | —     |
| Sud-Afrika      | 0,36          | 7,20                        | 18,00      | 10,80         | 5,40          | 36,00           | 4,95  |
| Sveda           | 1,70          | 34                          | 85         | 51            | 25,50         | 170             | —     |
| Svisa           | 1,12          | 22,40                       | 56,00      | 33,60         | 16,80         | 112,00          | —     |
| Urugvaja        | 0,60          | 12                          | 30         | 18            | 9             | 60              | 10    |
| Usona           | 0,38          | 7,60                        | 19,00      | 11,40         | 5,70          | 38,00           | 4,18  |
| Venezuela       | 1,52          | 30,40                       | 76,00      | 45,60         | 22,80         | 152,00          | 25,00 |
| Internacia rpk. | 1,30          | 26                          | 65         | 39            | 19,50         | 130             | —     |

AM = Asocia Membro (koncernas nur aliĝintajn landajn sekciojn)

MJ = Individua Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis 25 j., *Kontakto*)

MA = Individua Membro-Abonanto kun Jarlibro kaj *Esperanto* (kaj, ĝis ink. 25 j., *Kontakto*)

SA = Simpla abono de *Esperanto*, sen membreco de UEA/TEJO.

Kto = Abono de *Kontakto*, sen membreco de TEJO.

SZ-aldono = Aldona sumo por Societo Zamenhof.

AerR-aldono = Aldona sumo por aerpoŝta sendado de "Esperanto".


DM: Dumviva Membreco kostas 25 x MA (1250 gld.)

LMLP: Abono de unu volumo de *La Monda Lingvo-Problemo* kostas same, kiel unujara abono de *Esperanto* (30 gld.).

*Esperanto-Dokumentoj/Esperanto Documents*: 10 numeroj kostas la duonon de MA-kotizo (25 gld.).

Patrona Membro de TEJO: Tiu pagas duoble la abonprezon de *Kontakto*.

UN kaj Ni: Tiu bulteno kostas por 10 numeroj same kiel kotizo MJ.



# Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn v. en la Jarlibro 1975, p. 64-65. Mal-longigoj: I = informoj, P = Parolado, K = kurso.

## Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 31.45m (9540 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.  
15.30-16.00 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.45m (9540 kHz), 31.01m (9675 kHz). I.P.  
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz).

## Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 41.64m (7205 kHz), 16.85m (17800 kHz). I. P. ORF Esperanto, P.O.B. 700, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.  
10.30-10.40 Muritiba, 190m (1580 kHz). I. K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.  
11.00-11.30 Pekino, 43.35m (6920 kHz), 40.82m (7350 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.  
12.30-13.00 Pekino, 31.95m (9390 kHz), 25.04m (11980 kHz). I.  
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.

## Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.  
12.20-12.30 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.82m (15140 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.94m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur). Svisa Kurtonda Radio, Esperanto-Fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

## Marde

12.10-12.20 Gdańsk, 66.29 MHz (mod. frekv.). Ripeto, dek ta-

gojn poste, de la sabata programo el Varsovio, unu fojon monate.  
17.35-17.45 Vieno, 203m (1475 kHz). P. (Ĉiun kvaran mardon).  
21.30-21.45 Ibra Radio, per ondoj de Radio Mediteranea en Malto: 48.62m (6170 kHz). I. Ibra Radio, Box 396, S-101 25, Stockholm, Svedio.  
21.35-21.45 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz). Ripeto de la lunda programo.

## Merkredo

12.20-12.30 Berno; ondoj, kiel lunde. P. (s-ro Gacond).  
19.30-19.45 Sabadell, 203m (1475 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

## Ĵaŭde

21.35-21.45 Berno, ripeto de la lunda programo; ondoj, kiel marde.

## Vendrede

16.00-16.15 Romo, 104 MHz (mod. frekv.). K. Radioroma, loka privata stacio.  
20.00-20.30 Pekino, 47.85m (6270 kHz), 43.73m (6860 kHz), 31.98m (9380 kHz). I.  
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.  
23.05-23.20 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavio.

## Sabate

00.10-00.20 Varsovio, 1321m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo.  
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.  
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.  
16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 16.87m (17780 kHz). I.P.  
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.  
21.35-21.45 Berno, ripeto de la merkreda programo; ondoj, kiel marde.  
22.00-22.15 Valencio, 358m (836

kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

**RADIO VARSOVIO**, krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo, prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de la 21.00 ĝis la 21.30 per ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz); 2) dum la svedlingva programo marde de la 15.00 ĝis la 15.30 per ondoj 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz); 3) dum la danlingva programo dimanĉe de la 19.30 ĝis la 20.00 per ondoj 200m (1502 kHz), 75.84m (3955 kHz), 49.22m (6095 kHz), 48.90m (6135 kHz), 42.11m (7125 kHz).

**RADIO VATIKANO** prezentas dum la noktoj de sabato al dimanĉo, de 22.30 ĝis 00.30, per ondo 196m (1529 kHz), muzikan programon titolitan "Kun vi en la nokto" kun parolaj intervaloj en diversaj lingvoj; ĝi enhavas ankaŭ programeron en Esperanto, kiu okazas iam inter 23.15 kaj 23.45. Radiovaticana, Esperanto-fako, 00120 Città del Vaticano.

## ĜENERALA AŬDEBLECO

a) Stacioj nur loke aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Muritiba, Sabadell kaj ĉiuj elsendoj per modulita frekvenco.

b) Stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28m, 48.66m, 31.46m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Valencio (en la suda Eŭropo), Varsovio, Vatikano, Vieno (203m, 48.74m), Zagrebo, Ibra Radio.

c) Stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je la 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.64m, 16.85m en la sudorienta Azio).

ĉ) Stacio aŭdebla en Afriko kaj la orienta parto de Nord-Ameriko: Berno (31.28m, 25.60m, 25.27m, 19.82m, 19.60m, 19.44m, 16.83m, 13.94m).

# Anoncetoj

**TARIFO:** Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

**Adresŝanĝo:** D-ro R. Petri nun loĝas ĉe: Reinbekerweg 50, D-2050 Hamburg 80, FR Germanujo.

**Mi vendas kaj interŝanĝas brazilajn poŝtmarkojn uzitajn aŭ neuzitajn:** Alvacy Plauda da Silva, Caixa Postal 519, BR-88 500, Lages-SC, Brazilo.

**Italaj geknaboj 11-14 - jaraj** deziras korespondi tutmonde. Skribu unue al ilia instruistino: Mariarosa Pinori, Corso Lione 36, I-10141 Torino, Italujo.

**Klubo Esperantista de Skövde** kune kun porinfana bonfara organizo "Savu infanojn" en Tibro, Svedio, aranĝos internacian ekspozicion de infanaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj. La temo estas: "Libera motivo el mia hejmloko." Ekspoziciaĵoj estu senditaj al: Rädde Barnen, S-ino Lisbeth Lundberg, Bjurslingan 2, S-543 00 Tibro, Svedio, ĝis la 15a de januaro 1977. Inter la sendintoj estos lotitaj premioj en formo de svedaj popolaj memoraĵoj kaj paketoj de poŝtmarkoj. **Alvoko al esperantistoj:** Faru ĉion por sukceso de la ekspozicio! Propagandu!

**Vojaĝu senkoste:** Petu informojn ĉe Pasporta Servo — J.M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts le Roi, Francio. (10-jara servo de TEJO; utiligu kaj pligrandigu ĝin).

**20-jara laboristino**, de la grupo Aleksandra Kollontaj, deziras korespondi en lingvoj itala, angla, Esperanto, pri temoj de virina liberigo kaj kolekti ĉiulandajn poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: Anna Gasparotto, via Bainsizza 10, I-20054 Nova Milanese (MI), Italio.

**Esp.-librojn senpagajn** vi ricevos kom-pense por tre specialaj tekstoj en via nacia lingvo. Petu detalojn al: Manuel Halvelik, Gebroeders Blommestein, 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

**Blinduloj kaj vidantoj**, kune lernantaj Esperanton kadre de plurjara instrueksperimento, deziras korespondi tutmonde. Diversaj laborgrupoj: geinfanoj, geknaboj, plenaĝuloj. Dezirataj kontaktoj precipe kun unuagrada lernejoj, organizaĵoj, unuopuloj por kunordigo de instruaktiveco kaj sekvaj infanrenkontigoj. Adresu: Scuola Elementare Statale, Istituto Ciechi, viale Ignazio 100, Cagliari, Italio.

**LA TORNISTRO** — bona distro —, duonjara revuo, literaturaĵoj, diversaj. Abono 1976-77-78: 12 gld. Antaŭa trijara kolekto: 12 gld. Mendu ĉe UEA.

**Vojaĝante al Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio**, skribu sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj.


**KOREKTO:** S-ro E. Sunardo edzinigis f-inon Mirjana Ilić, kaj ne Simić, kiel ni erare anoncis en la sept. n-ro.

**Proponon al Unuiĝintaj Nacioj** propagandu ĉiulingve: Militfarantaj popoloj ĉiam devu militinfanojn senpatrajn per restadrajto eterna kiel senpatriulojn denaskajn leĝe agnoski. Johano Belezna, Hospitalo Alexius, D-4040, Neuss, FRG.


**Franca instruisto** deziras korespondi sone (per magnetofonaj kasetoj) pri multaj temoj. Unue sendu leteron por prezenti vin. Daniel Luez, 1, rue Faglain, F-02000 Laon, Francujo.

**Esperantistaj kolektantoj:** Senpaga registrado en niaj listoj tutmonde disvastigataj. Detaloj, klarigoj kontraŭ IRK. R. Melo, 34 Av. Russie, F-03700 Bellerive, Francujo.


**Taŭga legolibro** por lernantoj kaj progresintoj aperis: *Forkaptita* de R.L. Stevenson, fama romano pri Skotlando; elangligis Albert Goodheir. "Traduko admirinda" (W. Auld). £2.25, inkluzive sendelspezojn. Eldonejo KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. Samadrese: Eŭripido, *Bakĥantinoj* £1.20; Goodheir, *Merlo sur menhiro* (poemaro) £0.85.



2 irpk



3 irpk



7 irpk

La tri libroj kune kostas 10 internaciajn respondkuponojn, inkluzive la altan sendkoston. Mendeblaj ĉe: D-ro Nassif Isaac, 16, School Road, Crynant - Neath, Glam. - S. Wales, Britujo.

## Se vi vere ne scias,

kion donaci al persono, kiu ion meritas,  
pensu pri **Donaca Karto de la Libroservo  
de UEA.**

Vi pagas 5 guldenojn  
(aŭ egalvaloron), plus  
la sendokostoj 10%,  
kaj ricevas specialan  
karton, kiun vi plu-  
sendas — kun viaj  
varmaj bondeziroj,  
kompreneble —  
al tiu favorat(in)o.

Ŝi (aŭ li) povos tiam aĉeti laŭ propra  
elekto iun ajn libron aŭ diskon aŭ abonon  
ĉe la **Libroservo de UEA.**



## Esperanto-dokumentoj

Esperanto-dokumentoj *priskribas la laboron, organizon, kulturon kaj historion de la Esperanto-movado. Ili aperas unuavice en Esperanto kaj en la angla lingvo; laŭ la eblecoj aperos poste similaj serioj ankaŭ en aliaj lingvoj. La dokumentoj aperadas neregule kaj estas ekspedataj en faskoj po 3-4 numeroj. Tial la abono ampleksas ne difinitan periodon sed difinitan nombron da dokumentoj: 25,— gld. pagas 10 sinsekvajn dokumentojn en unu serio (Esperanta aŭ angla). Aboneblaj ĉe la landaj kotizperantoj aŭ rekte ĉe UEA.*

*Ĝis nun aperintaj: n-roj 1-4 en la Esperanta serio kaj 1-7 en la angla.*

Ĵus aperis

## FINANCA EVOLUIGO

**Manlibro pri la Financa Programo  
de la Esperanto-Movado  
de  
Humphrey Tonkin**

La libreto konsistas el dek ĉapitroj: Enkonduko — Fontoj — Bezonoj — Impostoj, leĝaro kaj rilataj demandoj — Dokumentado — Formala kaj neformala organiziĝo de la Financa Programo — La unua kontakto — Preparo de formala propono — Enkasigo kaj raportado — Konkludo.

Kvankam la studo celas ĉefe la nove lanĉitan Financan Programon de la Esperanto-Movado, ĝi estas ankaŭ aplikebla al aliaj financaj kampanjoj interne aŭ ekstere de la Esperanto-movado.

Konsilaro pri Esperanto-Agado, n-ro 4.

64p. 21 x 15 cm., broŝ.

Prezo ĉe la Libroservo de UEA: 4,80 gld.

### JEN VIA PROPRA INTERESO:

la de ĉiuj registaroj serĉata projekto de senriproĉa monda monsisistemo racia kun valorstabila ŝparmono. 16p. 12x20cm. Pagu aŭstr. S 45.— al poŝta ĝirkonto 7 503.218 de d-ro Josef Hartl, Vieno, Aŭstrio. Studu la broŝuron kaj disvastigu nacilingve la proponon.



## Altkvalitaj produktoj

desinfektado  
higieno

|                |                  |
|----------------|------------------|
| aerrefreŝigo   | betonhardilo     |
| tualetpurigilo | insekticidoj     |
| tubopurigilo   | tankprotektilo   |
| senkrustigilo  | multaj specialaj |
| herbicidoj     | produktoj        |

**Kemia Fabriko Bruno Vogelmann,  
D-7180 Crailsheim, FR Germanio**